



ESPERANTO

MARTO 1960

53 a Jaro — N-ro 652 (3)

esperanto

MARTO 1960

53a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 652 (3)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld 1/2 paĝo 64,— gld 1/4 paĝo 32,— gld 1/8 paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO :

Vinoba Bhave lernas Esperanton (vidu la art. p. 43).

Enhavo

U.E.A. Kreskas	41
Paroli	41
La Kampanjo Esperanto kiel baza lingvo	42
Vinoba Bhave fariĝas Esperantisto	43
Zamenhofa Jubileo en Pekino	46
Arĝenta Pokalo	47
Kongreso por Kongresorganizantoj	47
Operacio "Adoptaj Patroj"	49
Belarta Konkurso 1960	50
Internacia Diplomo	52
Hotel "Esperanto"	55
Grava Averta	57
Statistiko pri la Membraro de UEA en 1959	57
200 esperantistoj ekonomie apogas T.S.	58
U.N.E.S.C.O. oficialigas	59
Nova elmonro de la Universala Ekspozicio	59

Rubrikoj :

Tra la Mondo	48
Radio	49
C.E.D.	51
La juna Vivo	53
Novaj Libroj	54
Esperantista Vivo	55
Nekrologo	55
45-a U.K.	56
La internaciaj Konkursoj	58
Oficiala Informilo	59

Manuskripto por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

U.E.A. KRESKAS

U.E.A. celas gvidi la movadon tiel flekseble ke la programo kiun ĝi proponas estas adaptebla al la plej diversaj cirkonstancoj tra la tuta mondo, sed tiel firme ke samtempa kaj simila agado ĉie produktas la maksimuman efikon.

Ni konstatas, kompreneble, ke la sukceso de la plej bona centra programo dependas ankaŭ je la planado kaj gvidado de la plenumantoj surloke. Foje, dank' al sindonaj volontuloj, U.E.A. povas komisi iun por preni gravan parton de la respondeco kiel, ekzemple, en Montevideo kaj Hindujo. Sed eĉ kiam la ŝarĝo falas entute sur la lokajn esperantistojn, U.E.A. klopodas helpi kaj instigi per provizo de materialo kiel atestas la centoj da artikoloj en gazetoj bazitaj sur C.E.D. dokumentoj dum la Zamenhof-Jaro.

Evidente, la esperantistaro favoras ke U.E.A. prenu energian gvidan rolon, ĉar la Asocio kreskas kiam io aparta estas entreprenita. Sendube, tial, dum la Zamenhof-Jaro, U.E.A. kreskis ĝis 32.546 asociaj kaj 7.411 individuaj membroj kompare kun 27.138 kaj 6.698 en 1958, kresko de 5.408 kaj 713 respektive. Por la unua fojo ni havas pli ol tridek mil membrojn, proksimume la duoblon de la nombro da membroj en 1954, la jaro de la venko en Montevideo — en kvin jaroj la membraro duobliĝis. Gratulojn kaj dankojn pro tiu unika atingajo al ĉiu kiu kontribuis per konstrua laboro.

Elstarantaj inter la aliaj solidaj gajnoj kiujn ni ĝuis pro la plenumo de la Baza Programo (vidu paĝon 16 en la unua parto de la jarlibro, 1959) estas la preteco de gravuloj doni sian apogon per akcepto de membreco de la Internacia Patrona Komitato. Iliaj plej diversaj opinioj kaj interesoj klare montras la avantaĝon kiu fontas el la neŭtraleco de la Asocio. Ke ilia subteno estas pli ol formala estas montrita en lokoj, kie la esperantistoj donis al ili taŭgan okazon tion fari. Ekzemple, la granda financa helpo donita de la Pola Ŝtato, kies gravaj ministroj fariĝis patronoj, ebligis plej imponan kaj sukcesan universalan kongreson, kaj ilia mondkonata ministro de eksterlandaj aferoj donis personan inviton al la alilandaj ambasadoroj partopreni tiun omaĝon al D-ro Zamenhof.

En aliaj landoj kie la Zamenhoftagaj solenaĵoj taŭgis, ĉeestis ministroj kaj ambasadoroj, ekzemple en Kopenhago, de kie la paroladoj estis poste dissenditaj per radio kun traduko en la dana lingvo. Sekve, lernejoj kursoj certe estos starigitaj en Kopenhago, kiu estos trafa komenco de la nunjaraj klopodoj farataj laŭ la decido de la 44-a Universala Kongreso por enkonduki Esperanton en la lernejojn.

Multe pli ol tridekoble tridek mil sumas la nuna esperantistaro. La tridek mil estas la celkonsciaj personoj kiuj subtenas sian landan asocion kaj tiel fariĝas asociaj membroj de U.E.A., sed tiuj kiuj vere ebligas la laboron de U.E.A. estas la 7.411 individuaj membroj.

En 1958, eble por la unua fojo, ne okazis defcito en U.E.A.-kontoj, plejparte dank' al la sindona dediĉo de la laborantoj en la Centra Oficejo, kies longaj horoj estis rekompencitaj per minimumaj salajroj, kaj al la senpaga laboro de volontuloj.

Feliĉe, grande amasiĝas la laboro pro la sukcesoj de la Zamenhof-Jaro, kaj ni devas havi pli da rimedoj por fari ĝin.

Ni aparte celu en 1960 :

1. Novajn planojn por enkonduki Esperanton en la lernejojn.
2. Dek mil individuajn membrojn de U.E.A.

Paroli

Mi volonte akceptis la sugeston de la redakcio pritrakti en tiu ĉi rubriko la plej aktualajn demandojn de la Esperantismo. Temas pri serio da koncizaj artikoloj, kiuj aperos kiam ajn la spaco permesos. Estas bone deklari anticipe, ke ili estos kritikaj. Ne en senco detrua, negativa, sed kun celo pozitive konstrui: helpi al plibonigo kaj tiel ankaŭ al plifortigo de la Movado.

Ne estis malfacile elekti la unuan temon. La plena regado de la lingvo estis kaj plue restas la elirpunkto de ĉio atingita, nun farata kaj baldaŭ realigota. Ne temas sole pri la kapablo legi kaj aŭskulti, sed ankaŭ pri flua, senĝena aktiva mastrado de Esperanto fare de la tuta lingva kolektivo. Esperanto estas — ni diris tion milfoje — vivanta, plene funkcia lingvo. Tiun pozicion, esence gravan, el vidpunkto de ĝia socia funkcio, la Internacia Lingvo atingis dank' al la fakto, ke ekde la komenco ĝi estis komprenata de Zamenhof mem kaj de la plej klarvidaj esperantistoj ne kiel ia kodo aŭ nur skriba komunikilo, sed kiel plena lingvo uzota por ĉiuj formoj de interhoma rilatado kaj skribe kaj parole. Ke por efika utiligo de Esperanto interparole — de sciencaj debatoj, tra kongresaj diskutoj ĝis ordinaraĵoj — estas necesa bona lingvoscio de ĉiuj partoprenantoj, apenaŭ meritas menciion. Tamen, eĉ en la sferoj, kie ĝi estas aplikata ĉefe skribe-lege (literaturo, gazetaro k.s.), aŭ parole-aŭde (radio, prelegoj, paroladoj k.s.) kaj kie unuavide ŝajnas, kvazaŭ sufiĉus aktiva scio de malmultaj kaj nur pasiva de la amasoj, la regado de la lingvo estas antaŭkondiĉo de vera, rapida intelekta kontakto sen malfacilaĵoj. Ebligi precize tiajn rektajn ligojn estas la tasko de la Internacia Lingvo.

Esperanto estas facila. Multe pli facila ol la propra nacia literatura lingvo, se la kriterio estas gramatike senerara uzo. Tio ne estas slogano de la propagandistoj, sed pruvita fakto. Tamen, Esperanto ne estas tiel facila, ke oni povus ĝin majstri sen lernado kaj sen praktikado. Ellerni la bazojn de la lingvo oni povas en kelkaj tagoj ankaŭ sole, en la propra hejmo. Sed praktiki ĝin parole oni povas nur konversaciantes kun la aliaj. La Esperanto-societoj kaj ĉiuj Esperanto-organizaĵoj devas ebligi tion. Alie ili perdus la sencon de sia ekzisto. Diri, ke "ja inter samnaciaĵoj oni povas bone interkompreniĝi naci-lingve" estas preteksto por pravigi sian maldiligentecon. Aserti, ke "pro la komencantoj" oni devas paroli nacilingve signifas malebligi, ke la komencantoj iam fariĝu bonaj esperantistoj.

La sola rimedo por konservi, vastigi kaj firmigi la vivantecon de Esperanto estas paroli ĝin ĉiam, kiam eĉ nur du esperantistoj renkontiĝas.

D-ro Ivo Lapenna

H. W. Holmes

LA KAMPANJO

ESPERANTO KIEL BAZA LINGVO

Esperanto-instruistoj en multaj landoj konstatis, ke la studo de Esperanto donas al la infanoj ne nur bonan scion pri la ĝenerala gramatiko kaj vastan fundamenton de internaciaj radikvortoj, sed ankaŭ — pro la facileco de la lingvo — la kuraĝigan senton de kapablo estri fremdan lingvon. Esperanto sekve bone taŭgas kiel bazo je fremdlingva instruado.

Kaŭze de tiu konstato UEA antaŭ kvar jaroj faris alvokon al la landaj asocioj partopreni internacian kampanjon por la enkonduko en la lernejojn de Esperanto kiel la unua fremda lingvo, kiel "baza lingvo". La programo de la kampanjo klare montras, ke la alvoko turnas sin al la *esperantistoj-instruistoj*, kiuj en sia eco de pedagogoj rekomendas al la lernejoj instancoj utiligi Esperanton kiel enkondukilon je fremdlingva studado.

Sed estas memkompreneble, ke la *Esperanto-asocioj* devas organizi la kampanjon kaj diversmaniere subteni kaj helpi la instruistojn per kreo de internacia centro kaj de diverslandaj komitatoj. La centro pretigis, kunlabore kun la komitatoj, unuecan, ĝeneralan planon por la sistema internacia aktiveco, plue konsilojn pri la plej taŭga taktiko je sinturno al lernejoj aŭtoritatuloj kaj ankaŭ dokumentojn pri la spertoj atingitaj en diversaj landoj. La tuta materialo estas je dispono de ĉiuj kunlaborantoj, kiuj interesiĝas pri la kampanjo.

Dum la pasintaj kvar jaroj mi havis la feliĉon kiel "komisiito de UEA" gvidi la kampanjon kaj kunlabori kun bonaj esperantistoj en pluraj landoj. Dank' al tiu bona internacia kunlaboro estis ankaŭ eble atenti la cirkonstancojn en la diversaj landoj kaj realigi la kampanjon en tre elasta maniero por atingi ne nur nian minimuman postulon, ke Esperanto estu "baza lingvo". Sed kie troviĝas favoraj cirkonstancoj ni devas pligrandigi niajn pretendojn. Estas nome tute klare, ke la kampanjo "Esperanto kiel baza lingvo" celas ne nur utiligi la internacian lingvon kiel helpilon por aliaj lingvoj. Ricevinte lokon en la lerneja programo, Esperanto iom post iom pretendos, kaj certe ankaŭ ricevos, la rangon de ĉefa fremdlingvo, ĉar ĝi estos aŭ tiam estas ĉies dua lingvo. Cetere jam montriĝis en kelkaj landoj, ke la edukaj instancoj — sur la fundamento de nia origina propono — akceptis Esperanton ne nur kiel *bazan* lingvon sed samtempe kiel *komplementan* lingvon.

La kampanjo ĝis nun havis la plej grandan sukceson en Jugoslavio, sub la lerta gvidado de S-ro Rakuša. En pli ol 100 lernejoj Esperanto estis instruata kiel eksperimenta lingvo. Tre talentaj geinstruistoj gvidis la kursojn, kaj ili sisteme notis

siajn spertojn pri la instrumentadoj uzitaj, pri la nombro de lecionoj bezonataj kaj pri la lingva instruado ĝenerale. Por la estonta aktiveco koncerne la enkondukon de Esperanto en la lernejojn tiuj spertoj havas netakseblan valoron.

En Finnlando S-roj Setälä kaj Vilkki faris admirindan laboron, kiu donis kiel rezulton, ke la instruministerio unue konsentis devigan Esperanto-instruadon en unu lernejo (6 lecionoj en ĉiu semajno dum la tuta studjaro) kaj due aprobis la aranĝon, ke kelkaj blindaj studentoj rajtas anstataŭigi la latinan per Esperanto en la abiturienta ekzameno.

En Nederlando S-ro Burger gvidas la kampanjon. Oni sukcesis aranĝi diversspecajn, sukcesajn eksperimentkursojn.

En Danlando la speciala komisiono, prez. S-ro Nederland, atingis la rezulton, ke Esperanto estas eksperimente instruata en deko da lernejoj.

En Novzelando oni ricevis la aprobon de la parlamento utiligi Esperanton por la ĝenerala lingva edukado.

Pluraj aliaj landoj partoprenas la kampanjon, kvankam ili ankoraŭ ne povis raporti pri realigitaj kursoj. Belegan ekzemplon pri kuraĝo, taktika inventemo kaj persisto montras la norvegoj. Jam antaŭ tri jaroj ili komencis fari proponojn al la lernejoj institucioj. La unua propono estis malakceptita (en la urbo Trondhejm). La dua propono estis ankaŭ malakceptita (en Bergen). Sed la tria propono, pasintaŭtune, sukcesis, kaj sekve Esperanto estos devige instruata — kun aprobo ankaŭ de la instruministro — ekde aŭtuno 1961 en la urbo Sarpsborg. Imitinda ekzemplo!

Jam antaŭ kvar jaroj mi akcentis, ke mi ne atendas miraklojn, sed ke la sukcesoj venos nur iom post iom, kaj ke aparte la prepara periodo daŭros sufiĉe longe. Montriĝis tamen, ke la evoluo en kelkaj landoj multe superis miajn esperojn. Aliflanke mi estas fakte malĝoja pro tio, ke multaj landoj evidente tute ignoris tiun ĉi kampanjon.

Eble ili ne ŝatis la taktikon. Eble ili ne povis mobilizi la necesan energion kaj persistemon. Ĉar tiu ĉi kampanjo ja ne kondukos al subita venko de Esperanto, sed ĝi realiste kalkulas je progreso paŝon post paŝo. Tiel povos tamen evolui paralele la kresko de Esperantistoj-instruistoj kaj la nombro de Esperanto-klasoj. Alia avantaĝo de la kampanjo estas, ke ĝi — prezentita al la lernejoj institucioj de profesiaj instruistoj — povas progresi paralele kun aliaj proponoj de la internaciaj kaj landaj Esperanto-asocioj.

Ernfrid Malmgren

VINOBA BHAVE FARIĜAS ESPERANTISTO

En septembro 1959 la aŭstralia esperantisto S-ro John Matasin vizitis Hindujo. Survoje al Kaŝmir akompanis lin kaj lian familion s-ro Veerendra Adhiya, la delegito de UEA en New Delhi. Subite la aŭtomobilo devis halti, ĉar homamaso baris la vojon. Al la demando de la vojaĝantoj, oni respondis:

Vinoba Bhave estas ĉi tie.

S-ro Adhiya klarigis al S-ro Matasin, ke temas pri grava hinda sanktulo kaj socia reformisto. La aŭstralia sinjoro petis aŭdiencon kaj ricevis ĝin.

S-ro Matasin informis S-ron Bhave pri la ekzisto de Esperanto kaj pri ĝiaj avantaĝoj. La Aĉarjo ("majstro" en sanskrito, la titolo kutime uzata antaŭ la nomo de Vinoba Bhave) argumentis kontraŭ liaj diroj, kaj li klopodis defendi la poziciojn de Esperanto. Post tuthora interparolo, la asketeca blankbarba 64-jarulo fermis la okulojn kaj restis senmova. S-ro Matasin kaj S-ro Adhiya opiniis, ke la Aĉarjo ekdormis, laca pro la longa diskuto. Ĝuste kiam ili volis leviĝi kaj eliri el la ĉambro, Vinobaĝi (la sufikso -ĝi post hindaj nomoj signifas aman respekton) malfermis la okulojn kaj diris decide:

Mi volas lerni Esperanton. Se vi povas havigi al mi instruiston kapablan marŝi kun mi, mi tuj eklernos.

S-ro Matasin informis la Ĝeneralan Sekretarion de UEA kaj proponis kontribui kun 100 pundoj al la elspezoj de la eventuala instruisto. Prof. Lapenna alsendis la leteron al mi, kiel direktoro de APO. Li respondis samtempe: "En la Movado estas nur unu persono, kiu povus plenumi la taskon..... kaj mi ne scias ĉu ni povus lin konvinki iri denove al Hindujo, ĉar li ĵus pasigis du jarojn en Azio."

Sed antaŭ ol ekscii pri tiu ĉi frazo, tre flata al mi, mi decidis mem entrepreni la nefacilan taskon. Ĝia eksterordinara graveco por la evoluo de la Movado en Hindujo kaj en la mondo estis evidenta. Tian okazon oni devas ne preterlasi.

Al mia longa, tre persona letero, la Aĉarjo respondis per sia propra manskribo kaj la klasika afableco de la grandaj animoj: "Kara amiko, ricevis vian leteron kaj tre ĝuos vian akompanion dum niaj marŝadoj ĉi tie. Vi estas bonvena je iu ajn tempo taŭga por vi. Sincere via Vinoba Bhave."

Kaj post unu monato mi jam marŝis apud Vinobaĝi sur la sablaj vojetoj de Raĝastano, longe, longe antaŭ la aŭroro ekruĝigis la orientan horizonton.

Sed antaŭ ol priparoli la instruadon mem, mi volas mallonge prezenti mian "lernanton" por tiuj,

kiuj ankoraŭ ne konas lin, aŭ ne havas sufiĉe klaran ideon pri li.

Vinoba Bhave estas verŝajne la plej fidela vivanta disĉiplo de Gandhi. Malgraŭ la paso de la tempo kaj la evoluo li restis fidela al la penso, ke la forto de Hindujo estas en la vilaĝo, kaj ke ĝia rego, ĝia evoluo per si mem signifas la veran liberecon por tiu vasta lando.

La religio de liaj gepatroj lasis en lia animo neviŝeblan postsignon. En sia deka jaro li promesis al si seksan purecon kaj restis fidela al tiu promeso. Li ŝatis matematikon kaj studis sanskriton, sed forlasis siajn studojn por retiriĝi al monaĥejo de Gandhi, kies fervora disĉiplo li fariĝis.

Vinoba partoprenis la liberigan movadon en Hindujo, kaj plurfoje suferis malliberigon.

En 1951 en Talangana, proksime de Hajderabado, centoj da homoj pereis en kolizioj inter komunistoj kaj terposedantoj. Vinoba, armita per sia firma kredo je neperforto, piediris 500 kilometrojn ĝis Talangana por paroli kun la tieaj homoj. Tion li faris. La rezulto de la interparoloj estis, ke multaj bienuloj memvole donis al li parton de siaj grundoj por disdonado al senbienuloj. Tion li faris.

"La tero estas nek mia nek via. Ĝi estas de dio, kiu permesas al ni provizore ĉerpi ĝiajn fruktojn. Ni ĉiuj havas egalajn rajtojn al la tero", li diris. Kaj la movado nomata *Bhudan* — ter-donaco — estis naskita.

Vinoba daŭrigis sian piediradon, de vilaĝo al vilaĝo, petante terdonacojn kaj distribuante ilin. Administra aparato kreskis ĉirkaŭ la movado, kaj kreskis la nombro de grupoj kaj grupetoj de entuziasmoj, kiuj plenumis la saman laboron je lia nomo, en diversaj regionoj de Hindujo. Dum ok jaroj kaj duono ĉirkaŭ kvin milionoj da akreoj estis redistribuitaj.

Sed ne sufiĉas ŝanĝi la posedanton de la grundo. La neevoluintaj vilaĝoj bezonas konsilojn pri higieno, kunlaboro kaj unueco. Pensi kaj agi estis la sama afero ĉe Vinoba: li fondis *Ŝanti Sena* — pac-armeo — kies miloj da membroj memvole disiris por socia laboro en la hindaj vilaĝoj.

Baldaŭ la Bhudan-gvidanto konvinkiĝis, ke kvankam lia laboro bone progresas, ĝi estas nur guteto en la vasta oceano de la 600.000 vilaĝoj de Hindujo. Kaj li rimarkis ankaŭ, ke la ekestantaj ŝanĝoj ne estas sufiĉe palpeblaj. Nur se li disponus pri la tuta vilaĝo, li povus ĝin konvene reorganizi. Nova ideo aperis: *Gram-dan*, donado de vilaĝo. La vilaĝa estraro en konsento kun ĉiuj vilaĝanoj decidis donaci la tutan teritorion kaj ĉiun havaĵon de la vilaĝanoj al Vinoba, por redistribuo kaj



Vilaĝa sceno en Raĝastano, Hindujo.

ordigo de metodoj de plua evoluo. La eksperimento estis sukcesplena. Tuj sekvis aliaj vilaĝoj la ekzemplon. Kaj triumfa marŝo komenciĝis: ĉ. 3.500 vilaĝoj donacis sin kaj akceptis la leĝon de egaleco kaj frata kunlaboro por la bono de ĉiuj.

Por povi efektivigi la ampleksan programon, multe da mono estis necesa, kaj ankaŭ multaj kunlaborantoj. Du novaj aspektoj de la movado aperis: *sampati-dan* — dono de riĉaĵo — kaj *ĝivan-dan*, dono de la vivo. La unua persono kiu donacis sian vivon al Vinoba estis Ĝaj Prakaŝ Narajan, konata socialist-gvidanto, ofte indikata kiel sekvanto de Nehru. Pluraj miloj de vivodonoj sekvis lian.

La tuta movado estas nun nomata *Sarvodaja*, plialtigo de ĉiuj. Por vivteni la multajn kunlaborantojn, Vinoba kaj aliaj vizitante la multajn vilaĝojn, klopodas en ĉiu hejmo starigi *sarvodaja patra*, poton por plialtigo de ĉiuj. Ĝi estas argila poteto, en kiun la plej juna infano de la hejmo verŝas po unu manplenen da greno ĉiutage, kiun la kunlaboranto kolektas de tempo al tempo.

Liaj sekvantoj nomas Vinoba-n sanktulo pro la persista ŝinofero al la bono de ĉiuj, kaj la tuta popolo de Hindujo sentas por li grandan admiron kaj respekton. Foje, kiam li estis malsana de malario, kun granda febro, kuŝante en vilaĝa hejmo, oni volis transporti lin al malsanulejo en la urbo Patna. Sed li rifuzis dirante: "Ĉu en Patna ne mortas la homoj?" Nehru kaj D-ro Prasad flugis por viziti lin dum la malsano.

Post lia sukcesa agado en la regiono de komunistaj bataloj Nehru volis urĝe paroli kun li kaj starigi je lia dispono la fortojn de la plenumkomisiono. Li volis sendi aviadilon por venigi lin al Delhi. Sed li respondis: "Jes mi venos. Sed laŭ mia propra metodo kaj kiam la tempo permesos." Li troviĝis 1.200 kilometrojn for de Delhi, sed li alvenis post du monatoj. En Delhi li ekloĝis en iu

kabano eksterurbe, kaj tie vizitis lin Nehru, Prasad kaj multaj aliaj altranguloj.

Apud la ideo de la ĝenerala plibonigo de la vivnivelo de la popolo, la kerno de la ideologio de Vinoba estas la *neperforto*, kiun jam Gandhi tiel fervore predikis. Lia plej nova ideo estas la kreo de eta ŝtato sur la teritorio de Hindujo, en kiu la tuta aŭtoritato kuŝus en la manoj de la vilaĝo: nek polico, nek juĝejoj, nek armeo ekzistus sur tiu teritorio, kaj estus ligita al Hindujo nur per pagado de imposto. Tiu grandioza eksperimento de ŝtato sen perforto certe altirus multajn bonvolemajn alilandanojn, kiuj dezirus kunlabori en la projekto. Tial, la lingvo ĝenerale uzata en tiu ŝtato estus la lingvo de la neperforto, Esperanto. Tion ĉi diris al mi Vinoba en unu el la frumatenaĵoj diskutoj. Kaj tiu ideo certe klarigas lian intereson por la Internacia Lingvo.

Ĝis antaŭ nelonge Vinoba fiksadis sian vojiron je unumonata anticipo. Sed nun li decidis, ke li sekvos la ekzemplon de personoj el la antikvaj skribaĵoj, kiuj je certa aĝo entreprenis vojaĝojn en neantaŭviditan direkton. *Agjat-vas* estas nomata tio en sanskrito. Tial kompreneble ne plu atendas lin grandiozaj akceptoj kun multmila publiko, sed ĉio okazas en pli modesta skalo laŭ lia deziro.

Kial tial ankaŭ, kiam mi la 24-an de decembro alvenis al la urbeto Sirsa, mi ankoraŭ ne sciis kie troviĝas Vinoba. Feliĉe tie mi kontaktis S-ron Sitaram Bagla, fervoran sarvodaj-anon, kiu la sekvantan tagon alkondukis min per aŭtomobilo al iu vilaĝo, en kiu Vinoba tuj akceptis min.

Alta laŭ staturo, sed osteca kun longa blanka barbo kaj dikaj okulvitroj envolvita en lankovrilon li sidas sur dika tapiŝaro antaŭ eta alumina tablo. Kun afabla rideto li prezentas min al siaj kunlaborantoj: "Jen alvenis mia instruisto". Kaj tiam direktas sin al mi: "Bonvolu paroli al mi pri vi mem."

La sekvantan matenon je la 3-a sonorilo saltigas nin el la litoj. Sed tiu sonorilo ne validas por Vinoba. Li leviĝas je la 2.30, kaj kiel ajn frue ni alproksimiĝas al lia ĉambro, ni ĉiam trovas lian pordon malfermitan, kaj interne, ĉe la lumo de petrollampo li voĉlegas poemojn de siaj favorataj poetoj en sanskrito aŭ marathia, lia gepatra lingvo.

Je la 3.30 preĝkanto okazas en ĉeesto de la kunlaborantoj. Kaj je la 4.30 Vinoba rapidpaŝe elkuras el sia unutaga loĝejo, tenata je mano ambaŭflanke de du fidelaj sekretarioj, kiuj en la alia mano portas po petrollampon por lumigi la vojon. Post la triopo rapide formiĝas la triopa grupo de la sekvantaro, konsistanta el dudeko da viroj kaj virinoj. Cent paŝojn antaŭ ni gvidisto, konanto de la regiono, antaŭiras kun petrollampo.

Eĉ en Hindujo estas malvarmaj la vintraj

frumatenoj. Ni estas vestitaj per simplaj hindaj hejmfaritaj vestoj, kaj envolvitaj en lankovrilojn. Sub la tremanta lumo de la steloj, kaj en la ombro de la petrollampoj, nia fantomeca taĉmento silente rapidigas siajn paŝojn tra la profunda sablo de la senhoma vojeto.

Dum unu horo silento regas. Vinoba kaj ni ĉiuj meditas. Poste li, aŭ iu alia, komencas konversacion pri iu problemo politika, socia, organiza. Demandoj kaj respondoj interkruciĝas. Iu aŭ alia puŝas sin antaŭen por aŭdi pli bone, aŭ por partopreni la konversacion. Dum tiuj horoj ofte ni diskutis pri Esperanto.

Subite ni eksidas apud la vojo sur la malvarman sablon. En la silento eksonas la trankvila voĉo de Vinoba. Li komencas per citaĵo de malnova poemo. Ĝi inspiras lin por paroli pri moralo, politiko, edukado, socio.

Je la 7-a ni haltas denove. Vinoba matenmanĝas. Lia tuta manĝaĵo konsistas el 5 tasoj da lakto, je ekzakte ĉiu tria horo, komence de la 4-a matene. Nur en la dua taso li enmiksas iom da mielo. La kialo de tiu ĉi strikta dieto ne estas religia, sed sana: li suferas de duodena ulcero. Estas nekompreneble de kie li ĉerpas energion por sia laboro kaj la ĉiutaga marŝado de 12-18 kilometroj.

Survoje grupoj da vilaĝanoj atendas lin por saluti lin tuŝante liajn piedojn per la frunto.

Ĉie la kamparanoj salutas nin per la moto de Vinoba: *dĵai dĵagat!*, vivu la mondo, kiun li popularigis anstataŭ *dĵai hind*, vivu Hindujo!

Amaso da homoj atendas lin. Kaj la fragila blankbarbulo, anstataŭ ripozi post 18-kilometra marŝado, ekstaras antaŭ la publiko, kaj prelegas foje dum tuta horo.

11.30 estas la horo destinita al Esperanto. Vinoba atendas min kun la lernolibro en la mano. Li jam dum iu nokta horo bone trastudis du-tri lecionojn. Nun li legas anglajn frazojn kaj tradukas ilin esperanten. Preskaŭ perfekte. Malmulte restas al mi por korekti kaj instrui. La gramatikon li komprenas unuavide. Li ja lernis dudekon da lingvoj, kaj almenaŭ dekon flue parolas.

Partoprenas la lecionojn ankaŭ la angla kvakero Donald Groom, kiu dum 20 jaroj laboras en la hindaj vilaĝoj, unue kun Gandhi, kaj dum la lastaj tri jaroj kun Vinoba Bhave. Kun li mi kutime havas propran ĉambron en iu lernejo, kaj la tria kamarado estas klera kaj gaja religiulo — saduo — Brahmanand, kiu bonege zorgas ke ni havu ĉion kion ni povas bezoni.

S-ro Groom kaj mi faras kino-filmon, multon fotos kaj surbendigas prelegojn kaj kantojn.

Posttagmeze okazas la granda publika prelego, antaŭ multaj centoj, foje pluraj miloj da homoj. Jam antaŭ la prelego kutime oni legas la liston de homoj donacintaj grundon aŭ monon.

La manĝado estas komuna. La vilaĝo gastigas

nin per vegetara manĝaĵo, foje sufiĉe bongusta. Multe da lakto ni trinkas.

Posttagmeze ni havas okazon promeni tra la vilaĝoj. En multaj el ili ni estas la unuaj fremduloj. La vilaĝanoj afable akceptas nin. La vilaĝaninoj kovras sian vizaĝon, sed lasas trueton, tra kiu ili observas nin scivole.

Oni ekkuŝas je la oka, post komune kantata preĝaro.

Kaj je la 4.30 nova sabla vojo atendas nin.

La transporto de niaj litaĵoj kaj aliaj pakaĵoj okazas pere de du ĝipoj kaj kamiono.

Komence la ideo de Vinoba estis, ke internacia lingvo fariĝos la lingvo de la nacio, kiu unua memvole senarmigos sin. Al tio mi argumentis, ke en tiu kazo nepre Esperanto meritas tiun lokon, ĉar la esperantista popolo de la tuta mondo jam akceptis senarmigon de ĉiuj. Iom post iom tio konvinkis la eminentulon.

La trian tagon li demandis min, kiu kreis Esperanton. Dum tuta horo mi parolis pri Zamenhof kaj lia vivlaboro kaj vivbatalo.

Tiun saman tagon, sian kutiman duonhoran prelegon al siaj kunlaborantoj, Vinoba dediĉis al Esperanto. Jen kion li diris:

"Nun mi dediĉas iom da tempo al la lernado de Esperanto.

Tiu ĉi lingvo estas granda kaj sankta kreaĵo por la disvastigo de monda frateco. Kia grandioza ideo estis tiu de D-ro Zamenhof, kiam li ekkomprenis, ke komuna lingvo povus kunigi la homojn!"

Post ioma silento li forviŝis du larmojn el la okuloj, kaj aldonis: "La homo kiu dediĉis sian vivon al tiu ideo, estas laŭ mia opinio sanktulo kaj mahatmo ("granda spirito", vorto uzata nur por Gandhi kaj kelkaj aliaj plejgrandaj)".

Ĉe la fino de sia parolado, en kiu li skizis la atingojn de la movado, li diris:

"En la penso malantaŭ la internacia lingvo mi trovas grandan inspiron kaj ĝojon: la penso, ke ni povas doni al la mondo komunan neŭtralan ling-



La marŝantoj dum tagmanĝo.

ZAMENHOFA JUBILEO EN PEKINO

Por jubilei la 100-an datrevenon de l' naskiĝtago de D-ro L. L. Zamenhof, la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis memor-kunvenon en Pekino p.t.m. de la 13-a de Dec. 1959, kune kun la Ĉina-Pola Amikeca Asocio. Ĉirkaŭ 100 personoj partoprenis la feston, inter kiuj troviĝis reprezentantoj de diversaj kulturaj institucioj kaj ĵurnalistoj. La kunvenon prezidis S-ro Hujucz, prezidanto de ĈEL, kaj ĉeestis ankaŭ la vicprezidanto de Ĉ.P.A.A., S-ro He Ĉeng-hiang.

S-ro Je Laishi, la vicprezidanto de ĈEL, raportis pri la vivo kaj la laboro de la aŭtoro de la lingvo Esperanto kaj pri la jubilea 44-a U.K., kiun li partoprenis.

Parolis al la kunveno S-ro S. Flato, la provizora komisiito de la aferoj de la Pola Ambasadorejo, kiu ĉeestis kun sia edzino, kaj la pola kultura ataŝeo

S-ro A. Dembnicki. Parolis ankaŭ Prof. Cen Kihiang de la Pekina Universitato kaj S-ro Yeh Chun-chien.

Estis aranĝita en la kunvenejo ekspozicio pri Esperanto, kiun avide rigardis la ĉeestantoj. En la sama tago aperis en la ĵurnalo Gusngming Ribao artikolo de S-ro Sun Jong omaĝe al Zamenhof-Jaro. En la sekvinta tago raportis pri la kunveno multaj ĵurnaloj, laŭ raporto de Sinhua-a Informo-Servo. Je la 15-a aperigis la ĵurnalo Renmin Ribao, organo de Ĉina Komunista Partio, memorigan artikolon de S-ro Hujucz "La espero estas realiĝanta" kaj mallongan klarigan artikolon pri Zamenhof kaj Esperanto.


Ĉina Esperanto-Ligo

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

(daŭrigo de p. 45)

von, kaj pere de ĝi konstrui novan, unuiĝintan mondon!"

En pluraj aliaj prelegoj li menciis Esperanton, en la plej laŭda maniero. Kiel sekvo de tio, mi mem estis invitita en 8 vilaĝoj, kie ekzistas mezlernejo, prelegi pri Esperanto. Tion mi faris kompreneble, kaj la multajn interesulojn mi kontaktis kun la societo en Delhi.



Vinoba Bhave deiras de sur la podio post parolado.

Ĉiuj ĵurnaloj publikigis pli malpli longan sciigon aŭ intervjuon en rilato kun la fakto ke Vinoba lernas Esperanton, kaj tiuj artikoloj vekis grandan interesiĝon al nia lingvo en Hindujo. La publika konscienco komencas vekigi.

Post 20 tagoj, en kiuj Vinoba ricevis 18 lecionojn, li sentis sin jam sufiĉe forta por povi daŭrigi la lernadon sola. Li promesis al mi labori ĉiutage almenaŭ 15 minutojn. La unua libro kiun li legos estos la Biblio. Li legos ĝin kompare kun alilingva eldono.

Fine mi invitis la lerninton aliĝi al UEA. Li respondis, ke li estas tro libera por esti membro de iu ajn organizo. Sed ni konsideru lin nia membro, ĉar li plene aprobas nian agadon. En alia okazo li turnis sin al mi kaj diris:

"Konsideru min unu plua soldato en la esperantista armeo."


Vinoba Bhave fariĝis esperantisto.

**SUBTENU
A.P.O.!**

ARGENTA POKALO

por

LA ORATORA KONKURSO



La LoKoKo kaj la Estraro de UEA tre atente pristudis la metodojn por vastigi la partoprenon en la Oratora Konkursito dum la Kongreso. Montriĝis, ke la kongresanoj havas vere grandan intereson por tiu konkursito, sed bedaŭrinde la partopreno de la konkursantoj en la lastaj jaroj estis tute neadekvata al la interesiĝo de la publiko.

Por faciligi la partoprenon de kiel eble plej multaj gejunuloj ĝis 28-jaraj en la konkursito, la Estraro decidis, ke ĉiŝoj estu pluraj temoj, tiel ke ĉiu konkursito povos elekti tiun, kiu plej respondas al lia karaktero aŭ gusto. La aprobitaj temoj estas: 1. Internaciismo, Naciismo kaj Patriotismo; 2. La Internacia Jaro de la Rifuĝintoj; 3. Sporto — Ĉu Rimedo de Internacia Amikiĝo?; 4. Virinaj Rajtoj; 5. Aspiroj de la Junularo en Mia Lando. — La temoj estas tre variaj kaj certe ne ekzistas junulo aŭ junulino, kapabla paroli publike, kiu ne povus elekti unu el la 5 temoj por sia parolado.

La oratora konkursito okazos dum la U.K. en Bruselo laŭ la Regularo, publikigita sur la p. 33 de la broŝuro Statuto kaj Regularoj de UEA. La juĝkomisio konsistos el Ges-roj M. Jaumotte,

Prof. G. Waringhien kaj E. Lapenna.

La unua premio estos 2.500 belgaj frankoj, la dua premio 1.500 belgaj frankoj kaj la tria premio 1.000 belgaj frankoj. La unua gajninto ricevos, krome, transiran arĝentan pokalon, kiun por tiu celo donacis Prof. I. Lapenna. La pokalo havas la surskribon "Oratora Konkursito de UEA — Premio Ivo Lapenna". Sur la pokalo estos engravurita la jaro kaj la nomo de la gajninto, kiu rajtos ĝin konservi ĝis la sekvanta konkursito, kiam ĝi transiros al la nova gajninto ktp. Fine, ĉiuj gajnintoj ricevos specialan diplomon.

La aliaj partoprenintoj de la Oratora Konkursito ricevos pro la nura partopreno konsolajn premiojn en formo de libroj. Tiucele estas je dispono la sumo de 1.300 belgaj frankoj, kiu estos taŭge dividita laŭ la decido de la komisiono inter la negajnintoj.

La Estraro esperas, ke en Bruselo tre multaj gejunuloj partoprenos en la Oratora Konkursito. Estus tre bone, se la organizantoj de la landaj kongresoj farus similajn konkursojn kaj premias la unuan gajninton per subvencio, por ke li aŭ ŝi povu partopreni la konkurson en Bruselo.

KONGRESO POR KONGRESORGANIZANTOJ

Cent kvindek gvidantoj de internaciaj organizaĵoj renkontiĝos, de la 15-a ĝis la 18-a de marto 1960, en la Palaco de Beaulieu en Losano (Svisujo), kun cent kvindek specialistoj en la organizado de internaciaj kongresoj. La manifestacio estas organizita de la Unuiĝo de Internaciaj Asocioj en kunlaboro kun la specialigitaj internaciaj organizaĵoj, kiaj la Internacia Asocio de Kongrespalacoj kaj la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj. Kiel sekvo al la unua renkontiĝo en Düsseldorf en februaro 1959 — en kiu partoprenis ducent specialistoj el diversaj fakoj interesitaj en la orga-

nizado de internaciaj konferencoj — la Losana Kongreso pliprofundigos certan nombron da problemoj: ĝenerala organizado de kongresoj, administrado, starigo kaj disdono de dokumentoj, utiligo de la vidaj rimedoj, postuloj kaj perspektivoj pri ejoj, ktp. La Kongreso klopodos precizigi la normojn kaj alporti efikan kontribuon por la progresigo de kongresscienco. Universala Esperanto-Asocio estos reprezentita en la Kongreso pere de la Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro G. C. Fighiera.

Tra la Mondo

Aŭstrujo

La 13-an de novembro 1959 okazis fondkunveno de la Internacia Ligo Millennium Novum en Vieno. La celo de la Ligo estas kolekti ĉiujn aperintajn dokumentojn, kiuj rilatas al la venonta jarmilo kie ajn en gazetoj, ĵurnaloj, libroj, filmoj, radio aŭ televido publikiĝis antaŭvidoj koncerne al la evoluo ĝis la jaro 2000. Oni petas alsendon de tiaj dokumentoj kun indiko pri la datoj (loko, tempo, k.s.), kaj per via kunlaboro vi fariĝos membro de la Ligo (se vi tion deziras) sen pago de iu kotizo. La adreso: Ĝeneralsekretario Direktoro Alfred Adolf Rotter, Wien 9, Wasagasse 13, Austrio.

☆

En Polica Direkcio de Innsbruck s-ro Hans Steiner el Wörgl gvidas Esperanto-kurson por kriminalaj oficistoj.

☆

En la Instruista Seminario de Innsbruck okazas Esperanto-kurso (same kiel pasintjare). Tiun ĉi kurson partoprenas 24 instruistaj studentoj el 17 lokoj de Tirol. Kursgvidanto estas s-ro Hans Steiner, Wörgl.

Brazilo

En la urbo Santa Maria fondiĝis la 21-an de novembro 1959 nova klubo: Esperantista Societo de Santa Maria



(ESSM). La klubo ŝuldas sian ekĝermon al Lic. Tibor Sekelj, dum kies vizito D-ro Gonzalez akiris sian inspiron kaj entuziasmon por Esperanto. Dum la sekvintaj jaroj D-ro Gonzales diligente kaj lerte propagandis en altaj medioj de Monterrey per radio, televido, gazetartikoloj kaj per paroladoj en Rotariaj kaj aliaj kluboj, societoj kaj lernejoj. Sekve de tiu agado ĉeestis la Zamenhoffeston pluraj elstaraj personoj de la urbo, kaj eĉ la konsulo de Bolivio ĉeestis. La prezidanto de ELNA, S-ro Armin Doneis, kaj lia edzino ankaŭ ĉeestis.

Danlando

Ĉijare la jarkongreso de CDEL estos dum la pasko, de la 16-a ĝis la 18-a de aprilo, en Frederikshavn, kiu havas konvenan situon, ĉar ĉiutage estas ŝiprilatoj kun Oslo kaj Göteborg, kaj de Germanujo per trajno estas same

bonaj rilatoj. La prezoj por partoprenado kaj loĝado estas tre malaltaj. Ĉiuj informoj estas riceveblaj ĉe **S-ino Karen Skeltved, Knudensvej 74, Frederikshavn, Danlando.**

☆

La SAT-kongreso ĉijare okazos en la ĉarma urbo Aarhus, Danlando, en la tempo de la 23-a ĝis la 29-a de julio. — Postkongreso sekvos en Kopenhago.

Francujo

En septembro 1959 okazis en Jarnac granda kunveno aranĝita de Internacia Centro Interrilata de Esperantistaj Kampadistoj (ICIEK) por kampadistoj. Ĝi celis propagandan efikon al la neesperantistaj tendumantoj aliĝintaj kaj al la ĝenerala publiko. Proksimume 200 ĉeestis sed ne pli ol 20-30 esperantistoj. Ĉe la kampofajro la Angulema Grupo sub gvidado de Ges-roj Martines prezentis Esperantlingvajn kantojn kaj 2 skeĉojn por demonstracii la taŭgecon de Esperanto kiel parolata lingvo.

☆

La Kultura Esperantista Centro, Perpignan, tre diligente laboris dum la Zamenhof-Jaro por honorigi la memoron de D-ro Zamenhof, ekz. per eldono de libroj, grava propagando, organizo de kursoj k.s., kaj la 13-an de decembro okazis en Perpignon granda Zamenhof-Festo en la urbodomo, kie ĉeestis multaj eminentuloj neesperantistaj.

Germanujo

En Stockum, urbeto en la regiono Westfalen, la preĝeja sonorilo ricevis Esperanto-surskribon: Gloron al Dio kaj sur la tero pacon. Sankta familio protektu nin. Ho Dio donu pacon kaj reunuigon....

Hispanujo

"Aqui Bilbao" (Ĉi tie Bilbao), kies sekcio Esperanto sur la anteno estas aŭskultata de multaj esperantistoj, organizis konkurson kun allogaj premioj por la gajnintoj de la 14-a ĝis la 28-a de februaro. Ĉiunokte, je la 24-a horo, Radio Bilbao elsendis kvinminutan programon en diversaj lingvoj naciaj kaj en Esperanto, enhavantan unu demandon pri hispana temo: historio, literaturo, geografio. Estis entute 15 demandoj en 15 tagoj.

Hungarujo

La Zamenhof-festo en Budapeŝto havis grandan sukceson. Ĉeestis pli ol 500 personoj inter kiuj estis pluraj elstaraj gastoj, i.a. la justicministro D-ro Ferenc Nežval, membro de la Patrona Komitato. Ankaŭ la famkonataj esperantistoj D-ro K. Kalocsay kaj S-ro Baghy ĉeestis kaj aktoris. El la belega kultur-programo ni menciuj, ke la konata fortepian-virtuozo Imre Ungár en Esperanto parolis pri alia

granda polo, Chopin, kaj donis kelkajn muzikaĵojn de li. 70 membra orkestro inde finis la solenaĵon per "La Espero".

Koreo

La S-ro Hwangho Yooan faras grandan laboron kiel estro en orfejo en



Koreo. Troviĝas lernejo tie, sed mankas multe, i.a.: skribaĵoj, vestaĵoj, ŝuoj k.s. La orfejo jam ricevis donacojn de esperantistoj en Nov-Zelando, sed se aliaj deziras helpi, jen la adreso: S-ro Hwangbo Yooan, Hamyang Kyungnam, Korea Church World Service, Box 63, C.P.O. Seoul, Korea.

Pollando

La organizo Inter Klub komencis en septembro Esperanto-kurson por maroficiroj en la havenurbo Gdynia. La kurso daŭras dum 3-4 monatoj — dank' al la aktiva laboro de la esperantistoj en Gdynia. Gratulojn sendu al: M. Pietrzak, Al Zjednoezenia 136, Gdynia 1, Pollando.

☆

Membroj de Esperantista Rondo ĉe la Kulturdomo en Kłodzko honoris la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof i.a. per meto de



florkrono ĉe memorŝtonego en Duszyniki-Zdroj, kie la aŭtoro de Esperanto kuracis en la jaroj 1906—1909. La florkronon metis s-ro Rózanykwiāt, kiu persone konis D-ro Zamenhof.

Svedujo

Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo kaj Klubo Esperantista de Skövde aranĝos la 24-26-an de junio 1960 la III-an

SOMERMEZAN

JUNULAR-RENTONTIĜON

je "Simsjön", belega monta lago prok-

sime al Skövde. Ni disponas propran vilaon tute proksime al lago kun riĉaj eblecoj por bano, kanot- kaj velboat-sporto. Dum la tradiciaj somermezaj festotagoj estos aranĝoj je la lago kun dancado ĉirkaŭ tipe sveda "somermeza stango", ludoj kaj konkursoj per boatoj kaj aliaj eventoj.

Kotizo (en kiu loĝado kaj manĝado estas enkalkulitaj) estas nur 25 svedaj kronoj por junaj svedaj esperantistoj kaj 15 svedaj kronoj (= 3 dolaroj) por eksterlandanoj. Se iu volas plilongigi sian restadon, li aŭ ŝi pagos 5 svedajn kronojn (= 1 dolaro) potage.

Aliĝoj kaj informoj ĉe Börje Andersson, Ingegatan 4 A, Skövde, Svedujo.

Usono

La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ricevis la 21-an de novembro la informon de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko ke la Estraro de EANA malakceptas la proponon pri reunigo, kiun bonfide prezentis ELNA dum sia Kongreso en St. Louis pasintan julion. ELNA bedaŭras, ke la du organizaĵoj ne sukcesis kunfandiĝi dum Zamenhof-Jaro, por pli efike antaŭenigi Esperanton en Usono per unuigitaj fortoj, sed esperas pri fina sukceso post paso de iom pli da tempo.

Armin F. Doneis, prezidanto de ELNA, Pharr, Texas, Usono.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la januaran numeron.

Radio Roma. 1-III, Tra la literaturo; 4-III, Itala fama ciklisto Fausto Coppi; 8-III, Sankta Johano de Dio; 11-III, Leterkesto kaj bibliografio; 15-III, Italaj kanzonoj en Esperanto; 18-III, Novaĵoj el Italujo; 22-III, Itala verkisto Sibilla Aleramo; 25-III, Italujo kaj komponisto F. Chopin; 29-III, Historio de la itala teatro; Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 3-III, Honore al la internacia tago de virinoj; 10-III, Recenzo pri la Plena Gramatiko; 17-III, Energiprodukta potencialo en Jugoslavio; 24-III, Raportaĵo el la Esperantista vivo en Slovenio; 31-III, Novaĵoj pri la movado kaj respondo al korespondantoj; 7-IV, Radio-humoraĵo.

Voĉo de Ameriko dissendos ses programojn 30-minutajn en Esperanto komencante la 11-an de Marto. Ĉiu programo estos dissendata trifoje ĉiun vendredon: je 11.00 G.M.T. per ondoj 41.90 m. bone aŭdebla en Orienta Azio; je 12.00 G.M.T. per ondoj 19.72 m. bone aŭdebla en Sudorienta Azio; je 22.00 G.M.T. per ondoj 31.28 m. kaj 30.74 m. bone aŭdebla en Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Afriko kaj Azio.

Post tiu eksperimenta serio de elsendoj, la Voĉo de Ameriko decidis pri eventuala regula uzo de Esperanto. Raportojn, rimarkojn, demandojn sendu al D-ro W. Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D.C., Usono.

Radio Sofia. La dua dimanĉa programo je 22.30 nun estas aŭdebla per ondoj 41.35 m., 39.11 m., kaj 30.93 m.

Ĉu vi jam mendis la Memorlibron?

OPERACIO "ADOPTAJ PATROJ"

La Infanaj Kongresetoj fariĝis unu el la plej originalaj kaj interesaj elementoj de la Universalaj Kongresoj. Unikaj fenomenoj en la kadro de ĉiuspecaj internaciaj rekontiĝoj, ili diversmaniere estas la fiero de la Esperanto-Movado kaj la konstanta pruvo pri la vivanteco de la Internacia Lingvo.

Ilia ekstera brilo estas atingita per superado de multaj internaj organizaj malfacilaĵoj. Unu baro, tamen, ĝis nun ne estas venkita: la ekonomia. Por doni al siaj Kongresetoj komfortan kadron la Universala Kongreso ŝarĝas sin per 2/3 de la efektivaj kostoj kaj petas de la partoprenantoj kontribuon egalan al la restanta triono. De Mainz ĝis Bruselo la Universala Kongreso kvarobligis la kreditojn asignitajn al la Infana Kongreseto. Per tio ĝi atingis la maksimumon, kiun ĝi efektive povas per la disponeblaj rimedoj.

Tamen, tio ne sufiĉas. Estas ĝenerala deziro kaj intereso de la Esperanto-Movado, ke la aliĝado flanke de infanoj parolantaj Esperanton laŭnombre kresku. Aliflanke, ĉiu aliĝinta infano alportas efektivan deficiton al la Kongresa Kaso, kies nuna financa subteno kovras la kostojn de apenaŭ 40 infanoj.

Troviĝas en la mondo pluraj infanoj flue parolantaj la Internacian Lingvon, kiuj ne povas viziti

la Kongreseton ĉar ilia familio ne povas pagi la veturkostojn. Por helpi al la meritplenaj infanoj el makproksimaj landoj, la Loka Kongresa Komitato decidis starigi ĉenon de solidareco inter la esperantistoj tra la tuta mondo, kreante kategorion de subtenantoj, nomataj "Adoptaj Patroj".

Povas esti "Adopta Patro" de la Kongreseto (ne de aparta infano) ĉiu esperantisto aŭ Esperantista Societo, kiu pagos al la 45-a Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo (Banko de Bruselo aŭ Poŝtĝirkonto n-ro 1776.71) la sumon de **400.— b.fr.** Ĉiu "Adopta Patro" ricevos specialan diplomon. La nomoj de la "Adoptaj Patroj" estos publikigitaj en la Kongresaj Komunikaĵoj, en la Kongresa Libro kaj en la memoralbumo de la Infana Kongreseto. La sumoj kolektitaj per la operacio "Adoptaj Patroj" estos ekskluzive utiligataj por inviti infanojn el landoj malproksimaj aŭ kun devizaj malfacilaĵoj aŭ el nebonstataj familioj.

La Loka Kongresa Komitato alvokas precipe la **Esperanto-Societojn**, por ke ĉiu el ili transprenu **almenaŭ unu adoptan patrecon**. Por ĉiu individua esperantisto alvenis la okazo montri sian amikecon al la infanoj kaj kontribui al la progresigo de la esperantistaj infanaj kongresetoj.

La LOKA KONGRESA KOMITATO

GRAVEGA ALVOKO AL GEINSTRUISTOJ-ESPERANTISTOJ

En aprilo pasintjara la Centro de Esploro kaj Dokumentado entreprenis enketon pri la nombro de geinstruistoj-esperantistoj kaj pri la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. La nombro de respondoj estas ĝis nun tiel malkontentiga, ke ankoraŭ ne estas eble kunmeti la finan trarigardon.

Kiel konate, UEA nun komencis novan agadon por vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj, por pli firma kunligo de la lernantoj kaj geinstruistoj de lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata, kaj ĝenerale por pli efikaj rezultoj sur tiu ĉi kampo. Por ke UEA povu sukcese konduki tiun agadon, estas necesaj precizaj scioj pri kelkaj bazaj faktoj. Al tiuj apartenas la nombro de geinstruistoj, kiuj regas kaj kapablas instrui la lingvon, kaj la nombro de lernejoj, en kiuj la lingvo jam nun estas instruata. Sen tiuj bazaj scioj nenio estas farebla.

CED, do, plilongigis la limdaton por respondo al la demandoj de la enketo ĝis la 1-a de julio 1960 kaj insiste petas la geinstruistojn respondi ĝis tiu dato.

A. Geinstruistoj-Esperantistoj

Ĉiuj aktivaj aŭ emeritaj geinstruistoj kaj geprofesoroj, kiuj parolas Esperanton kaj kiuj instruas aŭ instruis kiun ajn objekton en kiu ajn lernejo aŭ universitato, respondi al jenaj demandoj:

(1) Lando; (2) urbo; (3) nomo; (4) adreso; (5) ĉu aktiva aŭ emerita; (6) nomo de la lernejo, en kiu vi instruas aŭ, se emerita, laste instruis: (7) grado de la lernejo sub (6) laŭ la leĝoj de via lando: ĉu elementa, mezgrada (liceo, gimnazio ktp.) aŭ altgrada (universitato aŭ samranga altlernejo); (8) objekto/j, kiu/j/n vi instruas/is; (9) ĉu vi estus preta, en okazo de bezono, instrui Esperanton en via lernejo aŭ en alia lernejo de via urbo aŭ loko? (10) dato kaj subskribo.

B. Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata

Ĉiuj geinstruistoj kaj geprofesoroj, kiuj instruas Esperanton en kiu ajn lernejo aŭ universitato, bonvolu respondi al jenaj demandoj:

(1) Lando; (2) urbo; (3) nomo de la lernejo (nacilingve kaj Esperante); (4) tipo de la lernejo: a/ elementa (aĝo ĝis proksimume 12 jaroj), b/ mezgrada (aĝo proks. 12 ĝis 18 jaroj), c/ universitato, kolegio aŭ simila altlernejo (aĝo proks. 18 ĝis 24 jaroj); (5) ĉu por knaboj-studentoj, knabinoj-studentinoj aŭ miksita; (6) nombro de gelernantoj,

kiuj lernas Esperanton, laŭ la sekso; (7) ĉu Esperanto estas instruata oficiale aŭ neoficiale, devige aŭ nedevige, en la kadro de la lerneja programo aŭ ekster ĝi; (8) kiom da jaroj oni jam instruas Esperanton en tiu lernejo; (9) nomo kaj adreso de la instruist/in/o aŭ profesor/in/o; (10) dato kaj subskribo.

La respondoj al la supraj demandoj nepre estu skribitaj sur aparta folieto de papero aŭ sur aparta poŝtkarto.

En ambaŭ enketoj la respondoj precize sekvu la vicordon de la demandoj. Ĉiujn respondojn bonvolu sendi al la kunlaboranto de CED por lernejaj aferoj: S-ro Devid Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.

Ĉiuj Esperanto-gazetoj estas petataj represi la supran alvokon.

1.959 Radio-Elsendoj en 1959

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED por radio, s-ro G. Larglantier el Parizo, la nombro de radio-elsendoj en la Internacia Lingvo en la jaro 1959 estis entute 1.959 kompare kun 1.560 en la jaro 1958. La elsendoj en 1959 daŭris precize 660 horojn kompare kun 459,35 horoj en 1958. Entute regule elsendis 22 radio-stacioj en Aŭstrujo, Brazilo, Bulgarujo, Francujo, Gvatemalo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Svedujo, Svislando kaj Venezuelo, kompare kun 17 radio-stacioj en 11 landoj en la jaro 1958.

La konsiderindan kreskon de la nombro de elsendoj en Esperanto kaj de la daŭro ĉefe kaŭzis la ĉiutagaj elsendoj de radio Varsovio.

Kun la escepto de la jaro 1957, la nombro de la Esperantlingvaj radio-elsendoj daŭre kreskis. Jen la precizaj ciferoj por la jaroj 1952, kiam fondiĝis CED, ĝis 1960: en 1952 estis 740 elsendoj, en 1953 entute 844, en 1954 kreskis al 1.012, en 1955 plia kresko al 1.168, en 1956 granda kresko al 1.428, en 1957 malkresko al 1.250, en 1958 plia granda kresko al 1.560 kaj, fine, en 1959 grandega salto al 1.959. La disvastiĝo de Esperanto en la radio respondas al la ĝenerala konsiderinda disvastiĝo de la lingvo en la lastaj jaroj.

Ĉiuj radio-aŭskultantoj, kiuj sekvas la Esperantlingvajn programojn, devus sendi de tempo al tempo leterojn aŭ poŝtkartojn al la radio-stacioj kun siaj komentoj. La landaj organizaĵoj kaj lokaj grupoj en urboj, kiuj posedas radio-staciojn, devus utiligi la supran informon por enkonduki Esperanto-elsendojn ankaŭ en tiujn radio-staciojn, kiuj ankoraŭ ne havas programojn en la Internacia Lingvo.

Nombro de Esperanto-societoj

CED entreprenis, pere de sia kunlaborantino pri statistiko, S-ino Emilija Lapenna, novan enketon kun la celo havigi precizajn informojn pri la nombro de Esperanto-societoj (lokaj grupoj). La koncerna demando estas jam sendita al ĉiuj

landaj asocioj. Temas pri tre grava enketo, kies rezulto ebligas ricevi klaran bildon pri la organizita Esperanto-Movado. La lasta dato por la respondoj estas la 31-a de marto. La lokaj grupoj petu demandilon de sia landa asocio.

ZAMENHOF-MEMORLIBRO

Post kelkaj semajnoj CED eldonos Zamenhof-Memorlibron kun gravaj artikoloj, dokumentoj pri la Zamenhof-Jaro, multaj fotoj kaj trarigardo de la ĉefaj eventoj en la Zamenhof-Jaro. Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de eminentaj esperantistoj, preskaŭ ekskluzive kunlaborantoj de CED. CED utiligas ankaŭ tiun ĉi okazon por esprimi publike koran dankon al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj per siaj elstaraj kontribuoj helpis al la bona sukceso de la Zamenhof-Jaro.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato de la 3-a de oktobro 1959	54	10	6
T. W. Bowyer, Britujo	1	0	0
F-ino N. Hanson, Britujo	2	2	0
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	10	0	
T. Boersma, Nederlando	3	9	
W. Roelofs, Nederlando	1	1	8
Gesinjoroj N. kaj H. Holmes, Britujo	14	16	0
W. Baaten, Nederlando	5	8	
L. Minnaja, Italujo	18	10	
N.N. en R. Nederlando	9	5	
B. B. Beaumont, Britujo	2	0	0
F-ino Lemonier, Francujo	7	0	
Stato la 31-an de decembro 1959	78	4	10

Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

En la pasintaj jaroj la sumo de la donacoj estis proksimume £ 200 jare. Kiel oni vidas, en 1959 la donacita sumo estis bedaŭrinde multe pli malalta ol kutime, kvankam precize en la Zamenhof-Jaro CED laboris multe pli ol kutime kaj eldonis gravajn dokumentojn kiuj helpis al la sukceso de la Zamenhof-Jaro. CED laboras per vere minimumaj financaj rimedoj, kiel ĉiu povas konstati el ĝiaj spezoj, publikigitaj sur la p. 34 de la Jarlibro 1959, Dua Parto. Tamen, almenaŭ tiuj minimumaj rimedoj devas troviĝi, se la esperantistaro deziras konservi tiun ĉi institucion. La laboro de CED grandparte dependas de la donacoj, kiujn ĝi ricevas. Se ili ne estos pli grandaj en la sekvantaj monatoj, tio endanĝerigos serioze la laboron de CED kaj eble eĉ ĝian ekziston.

Internacia diplomo

Dum la Varsovia kongreso la komitato de UEA starigis regularon (presita sube) pri Internacia Ekzamena Komisiono. Tiu komisiono IEK havas tre gravan taskon por plenumi en la estonteco de nia movado kaj estas tre dezirinde, ke la kapablaj gesamideanoj subtenu ĝian laboron.

Ĉiuj scias, ke sukceso en la lernejoj estas unu el la plej gravaj antaŭenpaŝoj por la sukcesigo de nia afero. Por atingi tiun sukceson UEA, la landaj asocioj kaj la instruistaj asocioj vige agadas. Pro tio okazas la kampanjo pri lernejoj organizata de S-ro Malmgren, pro tio ankaŭ en Varsovio la komitato de UEA ekklopodis pri plano por interŝtata konsento rilate al la instruado de Esperanto. Sed, se ni sukcesos, venos nepre la demando "Kiuj kapablas pri tia instruado, kian rajtigilon donas

laboro de IEK celas pretigi respondon al tiaj demandoj, donante diplomon altnivelan pri lingvo-scio, pri alta kultura nivelo kaj pri kono de la movado. Ĝi ankaŭ kontrolas la konon de la kandidatoj pri instrumentadoj kaj pedagogio, kvankam ĝi per tio ne celas anstataŭi la enlandajn legitimilojn por instruisto.

Plue por ĉiuj celoj, propagandaj vojaĝoj, enkonduko de Esperanto en fakajn rondojn ktp. estas tre dezirinde, ke ekzistu granda nombro de homoj vere kleraj pri la Internacia Lingvo. La utiligo de ĉi tiu diplomo estos, ke ĝi donu la necesan kvaliton kaj taŭgan kvalifikon al la ambasadoroj de nia afero.

Ni tial petas al ĉiuj, kies lingvo-scio akordas kun la postuloj de la regularo, kaj kiuj havas la necesajn atestojn, subteni la ideon kaj grandnombre partopreni la unuajn ekzamenojn. Ili okazos en Bruselo je du alternativaj datoj antaŭ kaj post la kongreso, la 30-an de Julio kaj la 6-an de Aŭgusto. En akordo kun la regularo estas eble, ke oni aranĝu aliajn ekzamenojn se bezono por tio montriĝos.

La anojn de la komisiono kaj ties sekretarion oni poste anoncos. Intertempe sendu vian aliĝon, kune kun la kotizo de tri usonaj dolaroj, al S-ro N. R. Smith, Estrarano pri Kulturaj Aferoj, 75 South Ealing Rd., LONDON W. 5. Britujo. Kotizojn oni ankaŭ sendu al la Centra Oficejo de UEA rekte aŭ per la landaj perantoj. Aliĝojn kaj petojn pri informo sendu nur al S-ro N. R. Smith.

INTERNACIA EKZAMENA KOMISIONO DE U.E.A.

I) CELO — La Internacia Ekzamena Komisiono (I.E.K.) celas, pere de altkvalitaj ekzamenoj, al prepariĝo de lertaj Esperantistoj de lingva vidpunkto necesaj por plua vasta aplikado de la Lingvo Internacia en la diversaj kampoj de la kultura, scienca, teknika, moderna aktiveco.

II) TASKO — La I.E.K. zorgas konsekvence pri internaciaj ekzamenoj okaze de Universal Kongreso aŭ de aliaj kulturaj internaciaj manifestacioj laŭ la decidoj de la Estraro de U.E.A.

III) KONSISTO KAJ FUNKCIO DE LA I.E.K. — La membroj de la I.E.K. estas nomataj de la komitato de U.E.A. La I.E.K. konsistas el 5 ĝis 7 membroj, kaj ĉeestas la ekzamenojn almenaŭ tri el ili.

La membroj de I.E.K. elektas inter si prezidanton kaj sekretarion.

La I.E.K. respondecas al la Estraro de U.E.A. kaj utiligas por sia laboro la centran Oficejon de U.E.A. en akordo kun ties direktoro.

Por esti elektitaj la membroj de I.E.K. devas esti universitataj profesoroj, kunlaborantoj de universitataj seminarioj, universitataj asistentoj. La komisiono rajtas al-elekti gravajn personojn por helpi ĝin laŭbezzone.

IV) KANDIDATOJ — Povas kandidatiĝi por ekzameno tiu, kiu prezentas ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno por instruado de Esperanto en sia lando.

Por la landoj, kie ne ekzistas tiaj ekzamenoj, la I.E.K. postulos de la kandidato skriban antaŭekzamenon kaj indikon de la instruiteco. La I.E.K. decidus pri la kandidateco de la petanto.


V) EKZAMENOBJEKTOJ —

- 1) Gramatiko
- 2) Literaturo de Esperanto (originala kaj traduka)
- 3) Historio de la Esperanto-Movado
- 4) Terminaroj
- 5) Instrumentadoj
- 6) Pedagogio (por kandidatoj ne profesiaj instruistoj)

VI) LERNOLIBROJ KAJ TEKSTOJ KONSILINDAJ —

- 1) *Kompleta Gramatiko* de Fruictier
Plena Gramatiko de Esperanto de Kalocsay-Waringhien
- 2, 3) *Historio de la Lingvo Esperanto* de Privat
Vivo de Zamenhof de Privat
Faktoj pri Esperanto de Lapenna
La Esperanto Movado de Stöp-Bowitz, Isbrucker

daŭrigo p. 58



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov
Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

AZIAJ KAJ AFRIKAJ PROBLEMOJ

Seminario de GEJ

En Limburg-Lahn, Germana Federacia Respubliko, okazis de la 27.XII.1959—2.I.1960 sub la honora protektado de la Limburga urbestro, S-ro Schneider, Internacia Junulara Seminario. La ĉefa temo estis studado de kelkaj aziaj kaj afrikaj problemoj. La seminarion organizis Germana Esperanto-Junularo. Partoprenis ĝin 42 gejunuloj el ses eŭropaj landoj: Anglujo, Belgujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavio kaj Nederlando. Ĉeestis ankaŭ F-ino Joŝiko Kafino, konata japana mondvojaĝantino. La seminario havis du celojn: 1. studi kelkajn problemojn kun kiuj nun baraktas el sub kolonialisma jugo venantaj popoloj kaj nacioj en Azio kaj Afriko; 2. akceli la uzadon de la Internacia Lingvo en la ĉiutaga vivo, en internaciaj rilatoj. Estu nur mallonge menciataj la prelegitaj kaj diskutitaj temoj.

F-ino Joŝiko Kafino prelegis pri Interŝanĝoj de kulturaj valoroj inter Okcidento kaj Oriento per la Internacia Lingvo. Ŝi esprimis esperon, ke iom post iom malaperos la preskaŭa nekontakteleco inter la kulturoj de malsamaj nacioj danke al Esperanto.

Junulo el Kolonjo, Ulrich Lins, tre detale kaj objekte analizis la problemon de la araba naciismo. Inter alie li konstatis, ke la celo de la progresemaj araboj estas stari egalrajtaj inter la du antagonismaj blokoj, batali kontraŭ kolonialismo, por paco, por interpopola amikeco. En la postprelega diskuto klariĝis pli detalaj — tamen relative kompleksaj demandoj, kiel ekzemple la problemo de la juda ŝtato Israelo, aŭ kial en la arabaj landoj la naciismo fariĝas potenco, ktp.

La prezidanto de TEJO, S-ro Günther Becker, parolis pri la aktuala alĝeria problemo. Ni esperu, ke la problemo solviĝos kontentige jam en baldaŭa estonteco helpe de UN. La partoprenantoj en la diskuto starigis la demandojn: Kia estas diferenco inter FLN (Naciliberiga Fronto) kaj MNA (Alĝeria Nacia Movado)? Kia estas la rolo de petrolo el Sahara en la nuna situacio? Kiel rigardas Germanujo tiun internacian problemon?

Ĉu vere Sovetunio helpas al alĝeriaj ribeluloj? Kian signifon havas la Fremda Legio? Kial alĝerianoj ne ricevas egalrajtecon en la kadro de Francujo? ktp.

La geseminarianoj aŭskultis sonbendprelegon pri senperforta liberiĝo de Hindujo de D-ro Edmond Privat, persona amiko de Mahatma Gandhi — gvidanto de la Hinda movado por liberiĝo de sub la brita kolonialismo. La diskuto disvolviĝis pri la situacio kaj grandaj malfacilaĵoj en kiuj nuntempe troviĝas Hindujo kaŭze de sia neevoluo. Gravajn problemojn kaŭzas al ĝi ankaŭ la pli ol 200 parolataj lingvoj. La Internacia Lingvo multege helpus ĝian pli rapidan evoluon. Estas nur problemoj kiel enkonduki ĝin. Al memstarigintaj landoj de Afriko kaj Azio jam foriris kelkaj prelegvojaĝantoj por klopodi enkonduki la Internacian Lingvon. La esperantistoj en Eŭropo povas mem helpi al tiuj klopodoj per instruado de Esperanto al eksterlandaj studentoj. Kiam ili foriros hejmen al Afrikaj aŭ Aziaj landoj, ili fariĝos disvastigantoj de la Internacia Lingvo inter la samlandanoj.

La problemon de delokitaj personoj priparolis la Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro Gian Carlo Fighiera. Li parolis pri elmigrintoj kaj pri rifuĝintoj, pri akcepto de fremda homo en nova regiono, en nova medio, pri instaligo de delokitaj personoj. La partoprenantoj aŭdis ankaŭ sonbendan paroladon de Tibor Sekelj: "La lingva problemo en Azio" kaj paroladon de Ljubiša Jevtić pri Jugoslavia Esperanto-Movado, akompanatan per bildoj.

Laŭ la programo okazis ankaŭ vizito al la Esperanto-Eldonejo Limburger Vereinsdruckerei kaj aŭtobusa ekskurso al proksima urbo Koblenz kaj akcepto ĉe la urbestro de Limburg, S-ro J. Schneider. Li ekdeziris, ke la seminarianoj konscie plenumu siajn taskojn kaj la seminario havu sukceson.

Trarigardante nun la rezultojn de la seminario, oni povas konstati, ke la bondeziro de la urbestro estas en ordo plenumita.

Tone Rogelj

KULTURA FESTIVALO EN JUGOSLAVIO 30.IV.—3.V.

Dum la Unuamajaj festotagoj, de la 30.IV. ĝis la 3.V. okazos en Split (Jugoslavio) la Tria Kultura Festivalo de jugoslaviaj esperantistoj. Ĝin partoprenos pluraj junularaj grupoj el la tuta lando kun siaj kulturaj programoj (skeĉoj, teatraĵoj, ĥorkantoj, ĥorrecitaĵoj, ktp.). Okazos ankaŭ oratora kaj literatura konkursoj.



Split estas antikva urbo ĉe la Adriatika bordo, kultura kaj industria centro de Dalmatio kun belaj plaĝoj, pluraj altlernejoj, kulturaj institucioj, muzeoj; la urbo mem estas granda muzeo — en ĝi troviĝas unu el la plej bone konservitaj monumentoj el la roma tempo en la mondo — la palaco de la imperiestro Diokleciano, kiu ankoraŭ nun post 16 jarcentoj estas centro de la urbo.

La restado ne estos multekosta: 700 din. tage por manĝado en komuna restoracio kaj loĝado en internulejo. Ĉiu partoprenonto devas sendi aliĝilon al Esperanto-Festivalo, Split, Dom brodograditelja. La aliĝilojn oni povas peti ankaŭ de Jugoslavia Esperanto-Federacio, Ljubljana, poŝtfako 275.

La junaj esperantistoj en Jugoslavio invitas siajn samaĝulojn, precipe el la najbaraj landoj, partopreni la Festivalon.

5-a INTERNACIA JUNULARA KUNVENO SUR FELDBERG 14.—18. IV. 1960

Germana Esperanto-Junularo denove organizas sian tradician Paskan internacian junularan renkontiĝon en junulara gastejo Hebelhof apud Feldberg proksime al Titisee, en la koro de la Nigra Arbaro. Ankaŭ la ĉi-jara renkontiĝo celas praktikan internacian kompreniĝon inter gejunuloj pere de Esperanto, perfektigi en Esperanto per prelegoj, diskutoj kaj abunda konversacio kaj nelaste refreŝiĝon dum ekskursoj per aŭ sen skio. La prezo por loĝado, hejtado kaj ĉiuj manĝoj estas 20 GM por gepartoprenantoj malpli ol 20-jaraj kaj 25 GM por la ceteraj.

Ĉiu partoprenanto devas plej malfrue ĝis la 31-a de Marto anonci siajn nomon, antaŭnomon, adreson, naskiĝjaron kaj profesion al Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, Mannheim, Germanujo.

Aliĝu al la T.E.J.O.-kongreso en Rotterdam !

Informoj ĉe : Helmi Veldhuyzen, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2.

Novaj Libro

Duope ricevatajn ni recenzas; unuope ricevatajn ni nur mencias.

) ricevata ĉe U.E.A.

SONĜE SUB POMARBO* de Julio Baghy, kun antaŭparolado de Marjorie Boulton, 221 paĝoj 16 × 22. Eldonis STAFETO, Kanariaj Insuloj, prezo 7,20 gld. aŭ 29 steloj.

Teatraĵo ekster scenejo iel similas fiŝon ekster akvo. Verfakte, plene gustas la legado de drama verko, nur kiam tiun ĉi oni jam rigardis kaj aŭskultis en teatro. Ĉar en tiu ĝenro ĉion aranĝis la aŭtoro ne por simpla legado sed por viva prezentado.

Tiel multaj estas la originalaj dramoj en Esperanto, ke facile oni povus ilin kalkuli per la fingroj de la mano. Tial, la prestiĝo de Julio Baghy venas ĝustamomente memorigi al la novaj, formiĝintaj trupoj, ke devas eniĝi en iliajn celojn la fojfoja prezentado de originalaj verkoj por plie antaŭenpuŝi tiun beletran ĝenron, kiu verdire konsistigas unu el la plej fortaj risortoj de viva beletra lingvo.

"*Sonĝe sub pomarbo*" estas ja vera provo de triakta originalaĵo surbaze de temoj interesaj por ĉiuj homoj de ĉiu tempo kaj ĉiu loko, nome: la homoparo fronte al la tempoŝanĝiĝecoj — la mezepoka revo de D-ro Faŭsto fronte al maljuniĝo — la ĉiuloka, ĉiutempa deziro de l' homo estri sian sorton.

"*La homa vivo ŝajnas — sapveziko; al ĝi sufiĉas eta tuŝa piko por tuj kreviĝi stulte kaj kruele kiam ĝi iĝis sepkolora bele.*" (p. 79)

Kaj en ĉi tiu inkubsonĝo de Adamo kaj Eva (li, orfa studento — ŝi, orfino de arbaristo), ĉiuj legintoj de la verkaro de J. Baghy rekonos ĝian ĉefan bazangulan ŝtonon: nur amo estas fonto de juneco, nur amo estas pli forta ol morto, nur amo estas vere plena vivo.

Tio estas ankaŭ okazo por revigi legendajn gurditaĵojn, por revoki bibliajn kaj beletrajn aludojn. Faŭsto, Genezo, Hamleto, Romeo kaj Julieto, La Sonĝo de Mezsomera Nokto, La Tragedio de l' Homo de Mádach, eble Tristano kaj Izolda, eĉ la Koko de Ed. Rostand!... Estus tro longa vico da referencoj por montri la influojn aŭ nombri la aludojn. En sia antaŭparolo Marjorie Boulton deklaras, ke "*Beletristo povus elverŝi multan inkon pri tiu ŝatata sporto de erudiciuloj: fontĉasado*". Eĉ, ŝi draste profetas pri "litroj da inko".

Beaumarchais, diris "sen libero kritiki, ne povas esti laŭdo flata", kaj en

tiu ĉi verko tiom da laŭdindaj penoj kaj teknikaj valoroj, ke ni sincere ne povas ne mencii kelkajn rimarketojn.

Interalie, ni ŝatus scii, kian nuancon la aŭtoro distingas inter *aĥ* kaj *ha*, inter *eĥ* kaj *he*: ĉu temas nur pri fonetika diferenco? La nova vorto *famuluso* povas esti por multaj konfuza pro la vorto "famulo". Ankaŭ la vorto *sobra* povas esti same konfuza, ĉar ĝi estas uzita kun neinternacia nuanco. (*). Sur la paĝoj 114-115, *Kukuk'kukola*, verŝajne pro preteraro, devas esti legata *Kuku' kukola*; sed kion pli alportas la neologismo *satisfakcio* p. 146, kaj *Hopsa* en la skeleta danco?

Iom longa impresis nin la unua akto, eble pro sia "marivod-aĵo", sed tre plaĉis al ni la sceno pri la butonkalkulado kaj florpetala ŝirado. Drastas la kvarverso pri la kalumnio:

"*El pul' ĝi elefanton farus klaĉe, honestan puron ĝi makulus aĉe, ne ĉesus flustri, kriĉi kaj skandali ĝis povus vidi nin en koton fali*". (p. 65)

En la dua akto ni same notis tre belan efekton karikaturan:

"*La filo de l' spicisto urba, kun naz' kukuma kaj kun kap' kukurba*". (p. 135)

Sed, kun la dua bildo (akto II) atingas la dramo sian kulminon, kaj ŝprucas aludoj pri la "sciencofikciaj" romanoj. La atommotoro jam elmodiĝis, kaj oni veturas per energio de fotonoj, kvazaŭ ŝvebante en plej senhumana scienco:

"*Maŝino tiel iĝis suvereno kaj Homo maŝinsklavo sen sentemo*". (p. 156)

Tre rimarkindaj efektoj de senrimaj versoj impresas en la paroloj de ABO, AZO kaj NOZA, la estontaj superhomoj, kiuj direktas la teron sub la ordonoj de majstro XOXO. Fine falas terura verdikto sub formo de kataklismo.

Jen estas la nova, interesa verko, kiun Julio Baghy prezentas mem al ni, kiel sonĝon de la herooj de *Printempo en aŭtuno*. Spektakloriĉa peco, ĝi estas ja plena je ĉiaj scenoefektoj lumaj kaj sonaj: subiras kaj leviĝas la suno, muĝas la vento, fulmobrilas kaj tondras eksploda kataklismo, nenio mankas, eĉ ne dancoj de lampiroj, griloj kaj cikadoj, gnomoj kaj elfoj, kaj ankaŭ rikanaj grincoj de skeleto. Malfacile estus difini la ĝenron de tia

formo, kiu konvenus al operoscenejo, uzas filman teknikon, kaj restas tamen versa dialogo. Eble de tio venas bizara impresoj, kiam nur teatra prezentado povus klarigi.

"Ĉu dramo estas ĝi? Nur komedio, zigzaga kuro de la fantazio....

Lirikan scenon sekvos bildo fabla, burlesko poste kun ruzaĵ' diabla, ne mankos bildoj por satiri, miri, post bona fino gaje hejmeniri....

(Prologo)

Kia ajn oni volas ĝin rigardi, ĝi estas eldonita kun la ĉiam alloga kaj konscienca prezento de STAFETO, kiu fakte iĝis nun sigelo de bona verko.

De la antikvaj dramistoj la moto estis "plaĉi kaj kortuŝi".... Eble, provinse ĉiajn dramajn aparatojn kaj montrinte siajn heroojn forirantaj fine sur la vojo al la vivo, volas Julio Baghy antaŭ ĉio alvoki la junulojn, ĉefe la novajn aktorojn, kaj instigi tiujn "iluzi-kavalirojn" al verkado por scenejo. Ĉu ne diris D-ro L. L. Zamenhof: "(...) ni devas memori, ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la vivo; tial ofte (precipe en vivaj dramaj dialogoj) pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed unuige peza kaj tro kabineja" (Lingva Respondo)?

Jean Thierry

(*) Kiel rimarkigas Prof. G. Waringhien en sia verko "*Lingvo kaj Vivo*" (p. 324) la esprimo de J. Baghy forgesi pri la damna sobro "ne esprimas strebon al ebrio, sed naŭzon pri fia realaĵo — sed, krom la Hungaroj kaj la Germanoj, kiuj legantoj komprenis" (...aŭ komprenos)?

ESPERANTO KAJ LERNEJO. Redaktita de Peter Zlatnar, eld. de Jugoslavia Esperanto-Federacio 1959, 200 p., prezo: 2 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

"Multaj kursgvidantoj pretervidas la fakton, ke estas longa vojo de kompreno ĝis la aŭtomata uzo."

"Pri la Esp.-literaturo ni estas malŝparemaj, ni eldonadas kaj eldonadas, sed kiam ni volas finfine utiligi la rezultojn de nia aktiveco, ili estas disĵetitaj en la tuta mondo, kaj poste estas malfacile kolekti literaturon pri unu certa temo. Ni scias semi, sed ne rikolti."

"*Esperanto kaj lernejo*" prezentas sin kun aro de pipraj puŝetoj, jen reprezentitaj de Rakuŝa kaj Neergaard.

Kaj, por ke tio estu tuj akcentata: Tiu ĉi libro, kun saĝa kritiko kaj spertaj konsiloj al ĉiuj kiuj sidas sur koĉerbenkoj de Esperanto-veturiloj, havas tiom vastan perspektivon, tiom profundigas en sia pritrakto de instru-taj aferoj, ke kun ĝi enmane ni povas malpli dubi pri fina sukceso de la Internacia Lingvo.

En 1957 la Jugoslavia Esp.-Federacio aranĝis Someran Pedagogian Semajnon en Kranjska Gora. La entrepreno havis grandan sukceson, kaj por ke la alt-

kvalitaj prelegoj havu okazon atingi pli vastan publikon, J. E.—F. decidis la eldonon de ili libroforme.

Kontribuis R. Rakuša, S. Stojnić, Dragica Zalar, Peter Zlatnar, dr. Stöp-Bowitz, S. Pragano, Ivo Rotkvić, dr. Paul Neergaard, kaj Petar Vukmanović, ĉiu donanta el sia kampo gvidan helpon.

Kiel modela manlibro ĝi estas zorge kompilita, pritraktanta unue la metodon, due lernolibrojn kaj modernajn teknikajn helpilojn, trie edukajn celojn kaj kvare eksterlernejajn aktivecojn de lernantoj. Aldone troviĝas ankoraŭ ĉapitro pri organizaj spertoj en Kranjska Gora. Sistema kaj klara indekso faciligas la uzon por konsulta libro.

Celtrafa al la aktuala situacio kun klopodoj por havigi lokon por nia lingvo en la lernejoj, ĝi per si mem estos oportuna helpo. Plurloke ĝi ankaŭ akcentas kial ĝuste al infanoj oni prefere instruu: La 6-10-jara infano havas ĉe lernado de lingvoj avantaĝojn super la junulo kaj plenkreskulo pro la pli granda adaptiĝemo de la voĉorganoj, spontanea kapablo de parolimitado, granda akceptemo por aŭditaj parolformoj kaj natura emo al imitado kaj ripetado.

Ĝuste pro tiu konstato oni iom sentas la mankon de ĉapitro pri la plej frua instruado, ĝi kiu okazas denaske, kvankam tio estus temo ekster kovro de la titolo.

Ke la libro cetere ne havas mallarĝan celadon, montras ĉapitro pri mnemoniko, kiu per sia tre sistema kaj iom teorieca pritrakto de la temo nepre turnas sin al plenkreskuloj. Aldoninde ĉi tie, ke ankaŭ el la vidpunkto de infaninstruado la mnemoniko havus perspektivon.

Bonŝanca esperantisto-instruisto kiu povas ĉerpi el jena fonto — kaj bonŝanca instruisto-esperantisto kiu povas ĉerpi ankaŭ por sia ĉiutaga laboro ne-
Esperanta. I. L.

ENGLISH-ESPERANTO RAILWAY TECHNICAL TERMS, *Fervojaj Terminoj de Edward M. Rosher, M. Inst. C.E. 57-paĝa kun antaŭparolo en la angla kaj Esperanto. Multobligita kun kovrilo. Tradukita el la franca-angla eldono de Lexique Technique Ferroviaire de SNCF (Fervojteknika terminaro de la francaj fervojoj). Prezo 8 \$ (16 steloj). Eld. de la tradukinto, "Tamalpais", Kingsley Green, Haslemere, Surrey, Anglujo, 1958.*

Dum pluraj jaroj IFEF (Internacia Federacio Esperantista Fervojista) laboras pri internacia fervoja terminaro. Ĉiujare en la fervoja fakongreso esperantista oni komparas la rezultojn de la pasinta jaro kaj planas la streĉojn de la venonta.

Antaŭ pluraj jaroj la franca-germana eldono de Lexique Technique Ferroviaire estis tradukita por la francaj fervojistoj, kaj la jena kajero estas la sama por la britaj.

2680 terminoj estas alfabeto ordigitaj laŭ la anglaj esprimoj.

La tradukinto sole respondecas por la eldono, sed 50 jaroj de praktika sperto kiel civila inĝeniero en pluraj mondpartoj donis solidan bazon por la nuna rezulto de la laboremo de Edw. Rosher. Konata kaj utiligata estas de lia mano la "Fervoja Terminaro", eldonitan en UEA-jarlibro.

Tajp-eraroj ne estas oftaj, kaj la ĝenerala impresado de la terminoj estas tre kontentiga. Por britaj fervojistoj la terminaro estos ege utila kaj taŭga. Ĉie kie la angla lingvo estas uzata en la tekniko ĝi helpas al pli rapida adaptiĝo de la internacia lingvo.

E. Henning Olsen

BIBLIOTHEQUE DE TRAVAIL, n-ro 437, 1. de julio 1959. La franca pedagogia movado iniciatita de s-ro Freinet aperigas la kolekton "Bibliothèque de Travail" (t.e. "biblioteko labora"), el kies 435 broŝuroj ĝis nun aperintaj du, pri Japanio kaj pri Aŭstralio, estas realigitaj dank' al kunlaborado de francaj kaj japanaj kaj aŭstraliaj instruistoj per Esperanto. En la ĵus aperinta broŝuro pri Esperanto pli ol 100.000 infanoj franc-lingvaj legos pri la avantaĝoj de tiu lingvo. La teksto kaj la bildaro, pri kiuj respondecas s-ro Léo Lentaigne, estas de kvalito modela. Gratulojn kaj peton de informoj oni sendu al Freinet, B.P. 145, Cannes (A.—M.), Francio.

P. S.

ĈINA ESPERANTISTA LIGO, P.O. Kesto 77, Pekino, ĵus eldonis belegan okbilden poŝtkartan serion "Homo". Prezo: US \$ 0.20, 0.50 gld. Mendebla ankaŭ ĉe UEA.

Esperantista Vivo

Ges-roj Erika kaj Günter F. A. Milanowski, Berlino, informas, ke ilia dua infano naskiĝis la 1-an de januaro 1960.

Nekrologo

S-ro Axel Fridén, faka delegito pri pacifismo, Torstenssonsgatan 3 Falköping, Svedujo, mortis. Ĝis sia lasta momento li senlace laboris por sia vivintereso, paco kaj justeco. Partoprenante la mondkongresojn kaj per longaj vojaĝoj li propagandis kaj varbis kunhelpantojn por disvastigi la pacan ideon.

Slijper. La 13-an de novembro 1959 forpasis 74-jara S-ro Chr. F. W. Slijper en Utrecht, Nederlando. La mortinto estis malnova fidela membro de U.E.A. kaj dum multaj jaroj funkciis kiel fakdelegito pri instruado. Li estis pensiita inspektoro pri la instruado kaj havas grandajn meritojn precipe por la Esp. movado en Nederlando,

S-ro Fred Willan, Blackburn, Lancashire, Anglujo mortis en Kristnasko-Tago, post mallonga malsano. Li esperantistiĝis en la jaro 1914, estis prezidanto de la Federacio Esperantista de Lancashire kaj Cheshire kaj membro de la Konsilantaro de la Brita Esperanto-Asocio. Li havis 65 jarojn.

S-ro Emile Borel, Del. de UEA en Arles, Suda Francujo, antaŭe en Lyon, subite forpasis en januaro 1960. Multaj samideanoj memoras la idealisman paron Ges-roj Borel. Li estis Estro de la Radio-sendejo LA DOUA en Lyon. S-ro Borel kaj edzino multe helpis al F-ino Lidja Zamenhof okaze de ŝia laboro per kursoj en Francujo.

S-ro Joseph Soyeur, peranto de U.E.A. en Belgujo, por R.B.L.E. delegito en Liège, Vicprezidanto de la Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj prez. de la loka grupo, mortis la 18-an de decembro.

S-ro Friedrich Ellersiek Frauenwald, Germanujo, mortis la 23-an de decembro 79 jaraĝa. La mortinto partoprenis dum multaj jaroj la lingvajn instancojn: Lingva Komitato kaj Akademio.

S-ro Pastro Emanuelo Jacobitti A. M., membro de U.E.A., Turkujo, mortis la 15-12-1959.

S-ro Gustav Schattat, Berlino, mortis la 30-an de decembro.

HOTEL ESPERANTO. En la diversaj gazetoj de la Esperantistaro oni ofte vidas reklamojn de hoteloj kaj pensionoj kies estroj esperas tiamaniere allogi kaj enlandajn kaj eksterlandajn Esperantistojn. Subteno de tiuj reklamoj estas grava, sed plejparte ĝi estas afero de komerco kaj la reklamantoj nek parolas Esperanton nek havas ian intereson en ĝi.

Sed en Cervia, Italujo, malfermiĝis lastjare hotelo kiu eble estas unika. Kompreneble ĝi estas komerca entrepreno, sed ĝi ankaŭ havas specialan intereson por Esperantistoj. La estro, ano de la Ravenna-grupo, vere kredas je Esperanto, kaj kun granda entuziasmo nomis sian hotelon "Hotel Esperanto", kaj li uzis la verdan stelon por la hotelsigno.

Dum mi restis en la hotelo, la anoj de la Ravenna-grupo venis por celebri la malfermigon de la hotelo.

Cervia estas marborda urbeto ne longan distancon for de Rimini, kiu situas ĉe la Adriatiko. La malnova urbeto mem, la bonaj butikoj kaj hoteloj, la pura sablo kaj la granda nombro de ombrodonantaj arboj sufiĉe allogas.

Se vi ferios ĉe la Adriatiko en Italujo nepre restu en la Hotel Esperanto, viale dei Mille 70, Cervia. Mi certigas vin, ke ĉio estos laŭ via gusto,

A.E.N., Anglujo



45-a Universala Kongreso de Esperanto

Bruselo - 30.VII — 6.VIII.1960 - Belgujo

Sub la Alta Protektado de
L. M. Baŭduino, Reĝo de la Belgoj

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 7 Januaro 1960

Fakaj kunsidoj :

Mendis Fakajn Kunsidojn :
— Esperanto Ŝakligo Internacia.
Adreso : S-ro Torsten Lindberg, Präsebo, Svedujo

— Internacio de Militrezistantoj :
"Bazaj principoj de pacifismo". Adreso : S-ro Alfred G. Tucker Birchcroft, Pilgrims way, Harbledown, Canterbury, Kent, Britujo.

— Kristana Esperantista Ligo Internacia. Adreso : S-ro De de Boer, Druivenstr. 32, Den Haag, Nederlando.

Muzikaj programoj :

La kvarteto "Beltono" de la Pola Radio kantos en Esperanto dum la muzikaj programoj de la Universala Kongreso.

Speciala kurso :

La Kongresa Komitato malfermis specialan kurson por la turismaj gvidistinoj (hôteses) de la urbo Bruselo.

Baza artikolo :

Jenaj lokaj Esperanto-Societoj mendis la Kongresan bazan artikolon por organizi belgajn vesperojn : Horsens (Danlando), Nova Zagora (Bulgarujo), Epernay, Fécamp, Wattrelos, Toulouse (Francujo), Bad Hersfeld (Germanujo), Barcelona, Moya (Hispanujo), Papa (Hungarujo), Poznan, Torun (Pollando), Selzach (Svisujo).

Blindula Kongreso :

La 30-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos en la kadro de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto. Adreso : S-ro C. A. Verlinde, Kromme-Mijdrechtstr. 66 (I), Amsterdam Z, Nederlando.

Filmoj en Esperanto :

Preskaŭ seninterrompe dum la kongresa semajno estos projekciataj en Bruselo serio da elitaj belgaj turismaj filmoj kun sinkronizita parolo en la Internacia Lingvo. La parolo estas zorgita de la Esperanto-Societoj en Antverpeno, Bruĝo kaj Bruselo.

Statistiko :

(ĝis fino de decembro) Alĝerio 4, Antiloj nederlandaj 1, Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 7, Belgujo 141, Brazilo 5, Britujo 43, Bulgarujo 6, Ĉeĥoslovakio 1, Danlando 18, Finnlando 6, Francujo 113, Germanujo 40, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Italujo 44, Japanujo 3, Jugoslavio 13, Kongo belga 2, Meksiko 1, Monako 7, Nederlando 85, Norvegujo 4, Novzelando 4, Pollando 37, Rumanujo 1, Svedujo 26, Svisujo 17, Turkujo 1, Unuiĝinta Arabio 1,

Urugvajo 1, Usono 2. Entute 639 el 33 landoj.

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 8 Januaro 1960

Postkongresa ekskurso :

Tri tagojn al Lieĝo, Aachen, Kolonjo kaj ŝipe sur la idilia Rejno.

Sabaton, la 6-an de aŭgusto 1960.

Alveno al Lieĝo per vagonaro el Bruselo en la fruaj horoj posttagmeze. Aŭtobusa vizito tra LIEĜO, en kies Belarta Muzeo oni povas admiri verkojn de Van Dyck, Laermans, Utrillo, Ingres, Chagall, Gaughin, Monet kaj Picasso. Komuna vespermanĝo. Vizito al dumnokta Lieĝo. Tranoktado.

Dimanĉon, la 7-an de aŭgusto.

Alveno frumatene al AACHEN. Aŭtobusa rondveturado : la Urbteatro, varmfonto "Elisenbrunnen" (kun gustumado de la kuracakvo), malnova imperiestra Katedralo, Urbodomo, Urbopordegoj (belfridoj), la Teknika Altlernejo (la plej granda en Germanujo kun 1700 eksterlandaj studentoj el 65 landoj).

Akcepto en la Urbodomo kun regalo, rondvizitado de la interno (kronad-salonego, k.a.). Komuna tagmanĝo. Vizitado al la mondfama Katedralo kun trezorejo : la marmora imperiestra seĝego de Karolo la Granda.

Koncerto en la kuraceja ĝardeno "Neues Kurhaus" kun diversnacia muziko kaj eventuale modernaj kanzonoj en Esperanto. Komuna vespermanĝo kaj forveturo vagonare al Kolonjo. Tranoktado en Kolonjo.

London, la 8-an de aŭgusto.

Forveturo el Kolonjo per vagonaro laŭlonge de la idilia REJNO tra Bonn, Koblenz kaj la pentrindaj St. Goar kaj Bacharach. Alveno en BINGEN kaj enŝipiĝo. Sephora ŝipekskurso sur la Rejno. Komuna tagmanĝo sur la ŝipo.

Reveno al KOLONJO. Komuna vespermanĝo kaj libera vespero.

Mardon, la 9-an de aŭgusto.

Aŭtobusa vizito tra Kolonjo. Adiaŭa komuna tagmanĝo.

Fino de la postkongresa ekskurso en la fruaj horoj de la posttagmezo.

Adoptaj patroj :

Por inviti infanojn el landoj malproksimaj aŭ kun devizaj malfacilaĵoj aŭ el nebonstataj familioj, la Loka Kongreso Komitato kreis kategorion de "Adoptaj Patroj" kun kotizo de 400.— b.fr. Listo de "Adoptaj Patroj" aperos en la kongresaj komunikoj.

Ciu "Adopta Patro" ricevos specialan diplomon.

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 9

Februaro 1960

Nova karavano :

Brita Esperantista Asocio anoncas karavanon al la Universala Kongreso. Komisiitino : S-ino Elsa M. Rapley, Fakaj kunvenoj :

Mendis fakkunvenon :

— Studenta Tutmonda Esperantista Ligo : "Problemoj de la Studenta Ligo, Enkonduko de Esperanto en la Universitatojn". Adreso : S-ro Paul Ciliga, 17 rue Duguay-Trouin, Paris VI, Francujo.

— Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista : "Internacia katolika laborista junularmovado". Adreso : Sac. A. Beckers, Kwaadmechelen, Belgujo.

— Internacia Fervojista Esperantista Federacio : "La belgaj fervojoj. Fervojoj kaj lingvobaroj. Prizorgado de belgaj fervojistidoj". Adreso : Esperanto, Gare Centrale, Bruselo.

— Internacia Geografia Asocio. Adreso : S-ro von der Ley, Ulrichstrasse 18, Tailfingen/Württ., Germanujo.

— Internacia Scienca Asocio Esperantista. Adreso : Prof. D-ro B. Popović, Zagrebačka 18, Sarajevo, Jugoslavio.

— Liberekonomia Movado : "Publikigo de la esperanta traduko de la "Natura Ekonomia Ordo". Adreso : S-ro F. Swinne, 77 rue de Nieuwenhove, Bruselo-Uccle.

Oratoro konkurso :

La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Oratora Konkurso enhavu jenajn temojn :

— "Internaciismo, naciismo kaj patriotismo".

— "Aspiroj de la junularo en mia lando".

— "La internacia jaro de la rifugiĝinto".

— "Sporto — ĉu rimedo de internacia amikiĝo ?"

— "Virinaj rajtoj".

Rajtas partopreni en la Oratora Konkurso gejunuloj ĝis 28 jaroj. La premioj estos jene dividitaj :

1-a premio = 2.500 b.fr.

2-a premio = 1.500 b.fr.

3-a premio = 1.000 b.fr.

La unua premiito ricevos, krome, arĝentan pokalon kun la surskribo "Oratora Konkurso de U.E.A. — Premio Ivo Lapenna" — persona donaco de la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. La pokalo, kun engravurita nomo de ĉiu unua premiito, estos transdonita ĉiujare de gajninto al gajninto. La juĝkomisiono konsistas el : S-ro M. Jau-motte, Prof. G. Waringhien kaj S-ino E. Lapenna.

Sekcioj :

La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Kongreso laboru en du sekcioj :

1) "Esperanto en la lernejoj". Prezidanto : Prof. D-ro I. Lapenna;

2) "Kultura kontribuo de Esperanto al la Granda Projekto de UNESKO Oriento-Okcidento". Prezidanto: S-ro Norman Smith.

Belgaj vesperoj:

Jenaj lokaj Esperanto-Societoj mendis la bazan artikolon por aranĝi belgajn vesperojn: Cittadella (Italujo) kaj Parizo (Francujo).

Stipendioj por kongresanoj:

En la kadro de sia konkurso, Esperanto-Filmo Germanujo disponigas du stipendiojn de po 150.— kaj 90.— g.m. por partopreno en la Universala Kongreso.

Sonbenda programo:

L.K.K. preparis 34-minutan sonbendan programon kun belga (flandra kaj valona) muziko, mesaĝo de la Prezidanto de L.K.K., parolado de la K.K.S. kaj oficiala invito de la Urbestro de Bruselo. La sonbendo estas senpage mendebla ĉe la kongresa oficejo flanke de lokaj Esperanto-societoj regule aliĝintaj al Landa Asocio.

Adoptaj patroj:

Transprenis la "Adoptan patrecon": Esperanto-Societo de Bruselo (du) kaj F-ino M. Kestens (Bruselo). Sekve, la operacio "Adoptaj Patroj" disponas ĝis nun pri 1.200.— b.fr.

Statistiko:

(ĝis fino de januaro) Alĝerio 4, Antiloj nederlandaj 1, Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 9, Belgujo 195, Brazilo 5, Britujo 104, Bulgarujo 7, Ĉeĥoslovakio 1, Danlando 30, Finnlando 11, Francujo 145, Germanujo 106, Hispanujo 8, Hungarujo 1, Italujo 55, Japanujo 3, Jugoslavio 32, Kongo Belga 2, Meksiko 1, Monako 7, Nederlando 128, Norvegujo 8, Novzelando 4, Pollando 49, Portoriko 1, Rumanujo 1, Sovetunio 1, Svedujo 36, Svisujo 19, Turkujo 1, Unuiĝinta Arabio 1, Urugvajo 1, Usono 6. Entute 987 el 35 landoj.

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario

GRAVA AVERTO

Ni avertas ĉiujn esperantistojn, ne prunti monsumojn al iu Leopold Kaufmann, aŭstro devenanta el Linz, kiu en pluraj landoj de Eŭropo pruntis monon de esperantistoj surbaze de fantaziaj planoj, sed ne repagis tiujn sumojn.

Ni alvokas ĉiujn esperantistojn, kiuj pruntis monon al la menciita persono kaj malgraŭ liaj promesoj ne rericevis ĝin, informi pri tio la Centran Oficejon de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam 2, Nederlando, kun ĉiuj detaloj pri datoj, lokoj, sumoj, ev. ricevita kvitancoj, promesita dato de repago ktp., se eble, ĉio kun subskribo de atestanto(j).

Ĉiu, kiu povas doni indikojn pri la nuna restadloko de Leopold Kaufmann estas petataj same informi la Centran Oficejon.

STATISTIKO PRI LA MEMBRARO DE U.E.A. EN 1959

	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	J-MJ	J-MA	Sumo
Lando										
Acoroj	—	—	1	1	—	—	—	—	—	2
Alĝerio	—	4	4	1	—	1	—	—	—	10
Angolo	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Antiloj Ned.	—	—	1	1	—	—	—	—	—	2
Argentino	500	1	31	—	—	10	—	—	—	542
Aŭstralio	86	5	77	13	—	14	—	—	—	195
Aŭstrujo	400	25	86	3	—	3	3	—	—	520
Belgujo	470	21	123	12	—	4	1	—	1	632
Bermudo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Brazilo	4965	47	214	57	1	29	1	3	2	5319
Britujo	775	76	394	67	3	68	4	3	15	1405
Bulgarujo	1125	3	70	1	—	3	—	—	—	1202
Cejlono	—	—	—	—	—	2	—	—	—	2
Cipro	—	—	1	1	—	—	—	—	—	2
Ĉeĥoslovakujo	—	4	88	—	—	3	4	—	—	99
Ĉilio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	99
Ĉinujo	—	—	6	—	—	1	—	—	—	7
Danlando	811	37	158	21	—	2	1	—	3	1033
Etiopio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Finnlando	—	77	194	3	—	1	1	7	11	294
Fr.Ekv.Afriko	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Francujo	1391	90	458	30	1	25	8	3	13	2019
Gabono	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Ganao	—	1	1	—	—	—	—	—	—	2
Germanujo	1850	77	388	61	—	11	1	7	19	2414
Greklando	—	—	7	—	—	—	1	—	—	8
Gvajano Brita	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Gvatemalo	—	—	10	—	—	—	—	—	—	10
Havajo	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Hindujo	—	—	10	—	—	—	—	—	—	10
Hispanujo	452	30	209	6	—	6	—	1	5	709
Hungarujo	—	5	27	1	—	—	3	—	—	36
Indonezio	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Irano	—	—	—	—	—	2	—	—	—	2
Irlando	—	1	5	—	—	—	—	—	1	7
Islando	—	—	21	4	—	3	—	—	—	28
Israelo	—	—	24	—	—	3	—	—	1	28
Italujo	1434	29	247	18	—	6	1	1	16	1752
Japanujo	1000	18	138	—	—	—	1	—	—	1157
Jugoslavio	4120	23	216	24	—	5	—	—	36	4424
Kameruno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kanado	—	3	48	8	—	1	—	—	—	60
Kenjo	—	—	2	—	—	1	—	—	—	3
Kolombio	—	—	6	—	—	—	—	—	—	6
Kongo Belga	—	2	2	—	—	—	—	—	—	4
Koreo	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Kubo	—	—	6	1	—	1	—	—	—	8
Kuvajto	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1
Libano	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Madagaskaro	—	1	10	—	—	—	—	—	—	11
Makao	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Malajo	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Maroko	1	—	15	7	—	5	1	—	—	29
Meksikio	—	1	14	—	—	1	—	—	—	16
Monako	28	—	3	—	—	—	—	—	—	31
Mozambiko	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Nederlando	553	68	373	30	—	18	4	—	5	1051
Nepalo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Njasalando	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Norvegujo	585	15	105	20	—	6	1	1	2	735
Nov-Gineo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Nov-Zelando	164	10	60	7	—	11	—	—	3	255
Peruo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Pollando	2500	—	628	1	—	2	1	—	21	3153
Portoriko	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Portugalujo	—	2	46	7	—	4	2	—	—	61
Rumanujo	—	—	3	—	—	—	1	—	—	4
Sarlando	—	—	20	—	—	—	—	2	—	22
Sovetunio	—	1	41	—	—	1	—	—	1	44
Sudafriko	—	2	16	3	—	3	—	—	1	25
Svedujo	1450	122	355	61	—	24	—	—	6	2018

Svislando	135	69	126	14	1	34	3	1	2	385
Tajlando	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Trinidado	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Turkujo	—	—	25	—	—	—	—	—	—	25
Un. Araba Resp.	—	—	—	—	—	2	—	—	—	2
Urugvajo	50	1	19	—	—	1	1	—	1	73
Usono	290	32	198	39	—	22	1	2	21	605
Venezuelo	—	—	37	1	1	—	—	—	—	39
Zanzibaro	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
80 landoj	25135	905	5393	527	7	340	45	31	186	32569

KLARIGO

La frontpaĝa bildo en la februara numero montras unu el la oficialaj gvidantinoj de Bruselo, kiuj nun pro la venonta kongreso lernas Esperanton.

La redakcio

200 Esperantistoj ekonomie apogas Tibor Sekelj en Hindujo

Kun kontento ni povas informi, ke la kolektado de poŝtmarkoj la unuan jaron atingis relative bonan rezulton. Ĝis la unua de februaro ni vendis p.m. por 2800 steloj = 200 usonaj dolaroj = ĉ. 700 gld. Tiu ĉi statistiko ampleksas nur la venditajn p.m. Restas stoko je taksita valoro de kelkcentoj da steloj.

Ni kore dankas al la 200 kontribuintoj sendintaj je valoro etendanta de 1 ĝis pli ol 300 steloj. Kiel konate la mono iras en la kason de A.P.O. Tibor Sekelj bezonas ĝin en sia agado, portempe en Hindujo.

Premioj por la kolektintoj:

N-ro 1: S-ro Eduard Schertcher, Chemin de la Guiche, Lons-le-Saunier (Jura) Francujo: "Retoriko".

N-ro 2: Flandra Esperantista Ligo per s-ro G. Maertens-Mallet, Pr. Leopoldstr. 51, Sint Kruis, Belgujo: "Virino ĉe la Landlimo".

N-ro 3: S-ro A. Vuori, Finby, Finnlando: "Homoj kaj Riveroj".

N-ro 4: D-ro J. Kondor, Dimaco, Kastlb. Amberg/Opf. Germanujo: "Misterio Minora".

N-ro 5: S-ro H. Tobiesen, Blichersvej 98, Odense, Danlando: "Ezopa Saĝo".

N-ro 6: S-ro Ernesto Sonnenfeld, Sarmiento 1236, Buenos Aires, Argentino: "La Homaro kaj la Mondbildo".

N-ro 7: S-ino C. Benschop—v/o Gugten, Frans Halsstr. 24, Utrecht, Nederlando: "Pasko".

N-ro 8: Rita Aagaard, 18 Milton Rd., Papatoetoe, Auckland, Novzelando: "Folioj el la bildolibro de Dio".

N-ro 9: Fr-ino Yolanda de Araújo Costa, Caixa Postal 3881, Rio de Janeiro, Brazilo: "Gruk".

N-ro 10: La familio Taylor, 653 Jones St. Albury, N.S.W., Aŭstralio: "Dekkinga fuĝas".

U.E.A. havas pli ol 32000 membrojn. Ĉar kelkaj kluboj kolektas kolektive, ni povas kalkuli, ke proksimume 1% de la membroj kontribuis. Ĉu estas eble aktivigi, en la venonta jaro, ankoraŭ unu procenton? Tibor Sekelj ĝojus. Ni permesas al ni presigi jenan instigan leteron: *Estimata sinjoro! Bone komprenante la gravecon de via entrepreno pri kolektado de p.m. profite al nia UEA, kaj dezirante helpi tiun valoran laboron, mi vin informas, ke antaŭ kelkaj tagoj mi sendis al vi, registrite, paketon enhavanta pli ol 1500 p.m. el diversaj landoj. — Laŭdante vian uti-*

(daŭrigo de p. 52)

4) Terminaroj aperintaj en la eldonoj de U.E.A.

5) Metodoj en Instruo de Esperanto de Rakuŝa

6) Pedagogia Revuo

VII) POSTULOJ RILATE LA SCION DE LA KANDIDATOJ

1) Perfekta kono de ĉiuj gramatikaj kaj stilaj reguloj kaj formoj en parolo kaj skribo

2) Kono de la traduka kaj originala literaturo

3) Sufiĉe detala scio de ĉiuj pli gravaj eventoj en nia movado

4) Kono de la terminaroj laŭ la specialiĝo de la kandidato.

5) Provleciono antaŭ la komisiono: klarigi gramatikon, sintakson, stilon

ĝojn, ne celante havigi premiojn sed nur helpi nian asocion al kiu, ankaŭ por helpi, mi sukcesis havigi 20 legan iniciaton mi klopodas ĉiam sendi miajn kontribua-

apogantojn en la Zamenhof-Jaro. — El Brazilo akceptu amikan saluton de la esperantistaro.

F-ino Yolanda de Araújo Costa

Informoj al niaj nunaj kaj estontaj kontribuantoj: Ne estas eble ĉiam respondi al ĉiuj demandantoj. Tial tiuj ĉi praktikaj informoj. Ni akceptas ĉiajn p.m., uzitajn kaj neuzitajn, novajn kaj malnovajn, lavitajn kaj nelavitajn. Ne deŝiru la p.m. de sur la papero. Ili estu aŭ kun papero, tonditaj aŭ deŝiritaj ĉ. unu centimetron ekster la rando de la p.m., aŭ lavitaj en varmeta akvo. Bonvolu meti la ellavitajn p.m. glate en la koverton.

Tiujn ĉi informojn ne por ĝeni niajn kontribuantojn, sed por ke ni enspezu kiel eble plej multe por nia komuna afero: disvastigi Esperanton en la aziaj kaj afrikaj landoj.

Sendu daŭre viajn poŝtmarkojn al

P. Zacho, Randbølvej 4, Kopenhago F. Danlando.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960

Stato je la 31-a de januaro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Svislando	2075	1450	69.88
2.	Nederlando	5093	3510	68.92
3.	Usono	3430	2065	60.20
4.	Britujo	6565	3885	59.18
5.	Danlando	2921	1645	56.32
6.	Francujo	7111	3920	55.13
7.	Finnlando	2515	1340	53.28
8.	Germanujo	7450	3070	41.21
9.	Japanujo	2470	955	38.66
10.	Svedujo	6605	2255	34.14
11.	Hispanujo	2837	925	32.60
12.	Belgujo	1985	638	32.14
13.	Norvegujo	2035	650	31.94
14.	Jugoslavio	7155	1775	24.81
15.	Italujo	4469	1085	24.28
16.	Brazilo	8260	1671	20.23
17.	Pollando	9045	110	1.22

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Kanado	615	420	68.29
2.	Aŭstralio	1076	536	49.81
3.	Portugalujo	575	270	46.96
4.	Aŭstrujo	1425	575	40.35
5.	Israelo	250	80	32.—
6.	Urugvajo	255	80	31.37
7.	Sudafriko	250	65	26.—
8.	Argentino	815	130	15.95
9.	Maroko	256	35	13.67
10.	Islando	270	30	11.11
11.	Novzelando	989	75	7.58

BELARTA KONKURSO 1960

ampleksanta ankaŭ la konkurson por la Premio Comella-Bassols 1960

Ni invitas niajn verkistojn konkuri en la Belarta Konkurso, 1960. Ĉi tiu konkurso, la dek-unua en la serio, ampleksas ankaŭ la duan konkurson por la premio Comella-Bassols.

LITERATURA SEKCIO :

1. *Originala poezio* (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
2. *Tradukita poezio* (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj; tamen la komisiono rezervas la rajton fari escepton en tiu postulo, se temas pri traduko el literaturo — ekz. la japana — kies poemoj estas esence mallongaj).
3. *Originala prozo* (novelo, eseo, artikolo, aŭ simile; ĉiu prozaĵo po 2.000-3.000 vortoj).
4. *Originala drameto* (ĉu por sceneja prezento, ĉu en formo de radia dialogo; maksimuma ludodaŭro, 25 minutoj).

Internacia komisiono juĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj okazos en tiucela kunsido dum la 45-a Universala Kongreso en Bruselo, kaj en la sama kunsido oni laŭtleĝos el la premiitaj verkoj. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion. Por ĉiu branĉo estos po tri premioj, de unua, dua, kaj tria grado; tamen la komisiono rezervas la rajton reteni premion aŭ premiojn, se ĝia opinio la cirkonstancoj tion indikas.

La komisiono ankaŭ aljuĝos diplomon kaj monpremion al tiu persono, kiu (laŭ la opinio de la komisiono) sendos la plej bonan verkon de verkisto premiita nek en ĉi tiu konkurso, nek en iu el la dek antaŭaj konkursoj.

En la kadro de la Belarta Konkurso 1960 okazas ankaŭ la dua konkurso Comella-Bassols. La konata kataluna samideano, S-ro J. Comella (Vich, Hispanujo) donacos la konsiderindan monsumon de 2000 hispanaj pesetoj por la plej bona *gaja rakonto en Esperanto*. La konkursaĵoj havu la amplekson de po 2.000-3.000 vortoj. Ili estos juĝataj de komisiono konsistanta el reprezentantoj de UEA kun katalunaj juĝantoj difinitaj de s-ro Comella. **GENERALAJ REGULOJ** por partopreno en ambaŭ konkursoj :

1. Principe, ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 45-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de UEA. Tamen, ĉe verkisto loĝanta en lando, kie plenumo de tiu kondiĉo estas ekstreme malfacila, oni laŭ bontrovo allasos konkursaĵon akompanatan de klarigo pri la cirkonstancoj.

2. La konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj; por unu konkurso aŭ por ambaŭ) :

por britoj, 1 ŝilingo, 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponon : 3 respondkuponoj maldekstre stampitaj de la poŝto (bonvolu kontroli tion) aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas malpermesata, la partopreno estas senpaga.

3. Oni rajtas konkursi per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe la traduka branĉo, oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj aperos laŭeble en la revuo "Esperanto" kaj sen la permeso de la redaktoro de tiu organo oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.

4. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo la nomon de la branĉo, por kiu ĝi estas destinita; antaŭ ĉio, oni indiku sur prozaĵo, ĉu ĝi estas destinita por la branĉo de originala prozo aŭ por la konkurso Comella-Bassols. Oni ankaŭ skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon, kiu efike kaŝas la identecon de la aŭtoro. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo kun la pseŭdonimo kaj aŭ sia kongresnumero aŭ membromarko de UEA. Eventuale, oni aldonu klarigon laŭ la senco de la dua frazo de Regulo 1.

5. Oni sendu ĉion : konkursaĵojn, slipon, eventuale respondkuponon, ktp, al la peranto : S-ro Albert V. King, 20 Lodore Road, Fishponds, Bristol, Anglujo.

La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 12-a de junio, 1960.

Gerald C. Jervis, Sekretario

PROVERBOJ pri komerco

Ni fidas Dion, ĉiujn aliajn nur kontraŭ kontanta pago.

(Usona)

Kiu ne havas ĝentilan vizaĝon, tiu ne malfermu butikon.

(Ĉina)

Kelkiu serĉas lanon, kaj revenas tondita hejmen.

(Hispana)

Se foje iu vin trompis, tiam tio estis lia eraro. Se li vin trompas duan fojon, tiam la eraro estas via.

(Rumana)

Akiri estas pli facile ol konservi.

(Serba)

En la komerco estas amiko tiu, kiu pagas kontante.

(Rusa)

Suldoj similas je infanoj, ju pli etaj ili estas, despli forte ili krias.

U.N.E.S.C.O.

oficialigis la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof

Telefona komuniko el Londono

Londono, la 27-an de februaro. Sciigo de unuaranga graveco atingis la Ĝeneralan Sekretarion de U.E.A. nur kelkajn horojn antaŭ la finpresigo de la gazeto :

La Plenuma Komitato de U.N.E.S.C.O. decidis dum sia lasta kunsido, ke la centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof estu oficiale celebrata en 1960.

Konforme al tiu decido, la aganta Ĝenerala Direktoro de U.N.E.S.C.O., S-ro René Maheu, sendis al ĉiuj registaroj kaj al ĉiuj neregistaraj organizaĵoj leteron CL/1406 de la 15-a de februaro 1960, kies ĉefa parto tekstas :

"TEMO : MEMORIGO DE DATREVENOJ DE GRANDAJ PERSONEKOJ.

Sinjoro,

Mi havas la honoron altiri vian atenton al la Decido akceptita de la Plenuma Komitato dum ĝia 55-a Sesio (55 EX-Decision 4.4) koncerne la memorigon de datrevenoj de grandaj personecoj en 1960.

La nomoj selektitaj per la Decido de la Komitato estas : D-ro Lazaro L. Zamenhof, polo, iniciatoro de Esperanto, naskita en 1859.

Konforme mi havas la honoron inviti vian Registaron partopreni en la memorigo de tiuj ĉi datrevenoj en kiu ajn maniero ĝi opinias oportuna."

Tiu ĉi historia decido de la supera monda organizaĵo por edukado, scienco kaj kulturo signifas la plej elstaran rekonon iam ajn donitan al D-ro Zamenhof aŭ al lia memoro pro la genia verko, kiun li donis al la homaro kaj pro la noblaj ideoj de humanismo, kiujn li ligis al ĝi. Ankaŭ oficiale Zamenhof eniris en la liston de senmortuloj.

En la nomo de la Komitato kaj Estraro de U.E.A. la Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario esprimas tutkoran gratulon al la ankoraŭ vivantaj membroj de la familio Zamenhof. Al la kunlaborantoj, kiuj helpis al atingo de tiu ĉi krono de la Zamenhof-Jaro kaj al ĉiuj aliaj, kiuj per sia laboro aŭ financaj kontribuoj ebligis ĝian sukceson, varman dankon.

Pliaj detaloj en la sekvanta numero de "ESPERANTO".

UNESCO COURIER

granda kultura revuo eldonata de
U.N.E.S.C.O.

publikigis en sia numero de
decembro 1959 grandan arti-
kolon pri Zamenhof

Tiu numero en angla, franca, his-
pana aŭ rusa lingvo estas ricevebla
ĉe la landaj U.N.E.S.C.O.-instancoj
kaj ĉe U.E.A.

Montrinda al ĉiuj neesperan-
tistoj.

Prezo : inkl. sendkostojn : 0,50 gld;
2 steloj.

Mendante, indiku la deziratan
lingvon !

NOVA ELMONTRO DE LA UNIVERSALA EKSPOZICIO

La oficejo "Esperanto ĉe la Instru-
ado" en Nederlando, dank'al sia tre
energia direktorino F-ino D-do
C. M. Burger, montras grandajn akti-
vecojn en la lasta tempo. En tiuj ĉi
monatoj la nederlanda parlamento
traktas revizion de la leĝaro pri
instruado. En ĝia kadro la nomita
oficejo entreprenis peticion submetitan
al la registaro, por kiu estas kolektitaj
en la momento kiam ni skribas tiujn
liniojn, jam 16.105 individuaj kaj
759.681 kolektivaj subskriboj. La peticio
petas unue ke la leĝo malfermu la
eblecon ke Esperanto estu fakultative
instruata en la elementaj lernejoj kaj,
due, ke la Esperanto-diplomo estu
egalvalora al la diplomo pri elementa
instruo pri aliaj lingvoj. Por doni al
la parlamentanoj la eblecon esti in-
formitaj pri la Internacia Lingvo
antaŭ ol ili devos decidi pri ĝi, la
oficejo aranĝis en unu el la salonoj
apartenantaj al la parlamenteja kon-
struaĵaro la Universalan Ekspozicion,
siatempe kompilitan de C.E.D. por la
elmontro en Montevideo. Ĝi estis bone
aranĝita kaj donis, kiel ĉiam, klaran
bildon pri ĉio atingita per la Inter-
nacia Lingvo. La Inaŭguron faris D-ro
Inĝ. M. H. Damme, pensiita ĝenerala
direktoro de P.T.T., homo kun granda
prestigo en Nederlando, kiu ĉiam
montris sin ege favora al Esperanto.
Ĉeestis multaj ĵurnalistoj kaj ĉiuj
gravaj gazetoj raportis pri la ekspoz-
icio.

M. H. V.

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de februaro 1960

N-ro 324

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de januaro kaj
ankaŭ por komparo je la fino de januaro 1959 :

	1959	1960
Asociaj membroj	1165	3380
Individuaj membroj		
MJ	396	344
MA	2497	2392
MS	319	317
Pat.	6	3
DM	333	346
HM	46	40
JMJ	11	13
JMA	76	78
	3684	3533
	4849	6913

DELEGITOJ

Aŭstralio

Canberra (AC.T.) D : vakas.

FD (katolikismo) : vakas.

Sydney (N.S.W.) FD (filatelo) : S-ro
Clement Hickey, inspektisto, P.O.
Box 23, Annandale.

Belgujo

Lokeren (Or. Flandrujo) D : vakas.

Brazilo

Rio de Janeiro (Distrito Federal) FD
(radio-amatorismo) : vakas.

Santos (S. Paulo) FD (pafo al la celta-
bulo) : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Doksy (Ĉeĥa) D : vakas.

Etiopio

Addis Ababa D : vakas.

FD (medicino) : vakas.

Francujo

Brezolles (Eure et Loir) FD (vojoj) :
S-ro Auguste Broise, inĝeniero, 18
rue de Paris.

Calais (Pas-de-Calais) FD (instruado) :
vakas.

La-Garenne-Colombes (Seine)

D : vakas.

Saint-Cloud (Seine et Oise) D : vakas.
FD (bankaj aferoj) : vakas.

Germanujo

Aalen (Württemberg) D : vakas.

Fulda (Hessen) FD (turismo) : vakas.

Hilders (Rhoen) (Hessen) D : S-ro Fritz
Lautenbach, fervojisto, Bahnhof-
strasse 26.

FD (turismo) : la D.

Mülheim (Ruhr) D : vakas.

Hispanujo

Las Palmas de G. Canaria JD : vakas.

Jugoslavio

Kanjiza (Vojvodina) D : vakas.

FD (fajrobrigadaj aferoj) : vakas.

Sarajevo (Bosna i Hercegovina) FD
(muziko) : vakas.

Slav.Brod (Hrvatska) VD : vakas.

Nederlando

Krommenie (Noord Holland) D : vakas.

Norvegujo

Bergen FD (instruado) : vakas.

FD (industrio) : vakas.

Portugalujo

Lisboa FD (turismo) : vakas.

Svedujo

Fyrunga (Västergötland) D : vakas.

Svislando

Glarus JD : vakas.

Turkujo

Iskenderun (Hatay) D : vakas.

FD (katolikismo) : vakas.

Usono

Chicago (Illinois) VD : S-ro Ihsan
Zulfikari, bibliotekisto, 2215 North
Dayton Street.

FD (edukado) : La D.

Falmouth (Mass.) D : vakas.

Greenfield (Mass.) D : vakas.

San Mateo (Calif.) D : S-ro George
E. Forsberg, eksrestoraciisto, 112
Ottawa Street.

Springfield (Mass.) D : S-ro Warren
H. Gould, instruisto, 941 Sumner
Ave.

FD (edukado) : la D.

Woods Hole (Mass.) FD (biologio) :
vakas.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1959

521 Rizzo, D-ro Pietro, Catania, Italujo.

522 Freeth, S-ro R., Palmerston, Nov-
Zelando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1960

112 Birch-Olsen, S-ino S., Greaker,
Norvegujo.

113 Bugge-Paulsen, S-ro Kapt. R., Oslo,
Norvegujo.

114 Engen, S-ro Per, Drammen,
Norvegujo.

115 Falch, S-ro Aage, Kragerø,
Norvegujo.

116 Flodmo, S-ro Johs, Mo i Rana,
Norvegujo.

117 Fygle, S-ro Björn, Bodø,
Norvegujo.

118 Maarli, S-ro E., Bodø, Norvegujo.

119 Pedersen, S-ino Aagot, Mo i Rana,
Norvegujo.

120 Ringstad, S-ro G., Torp, Norvegujo.

121 Støp-Bowitz, S-ro C., Oslo,
Norvegujo.

122 Thorvaldsen, S-ino E. Asker,
Norvegujo.

123 Baur, D-ro A., Liebefeld,
Svislando.

124 Jayet, F-ino E., Morges, Svislando.

125 Barta, S-ro R., Denver, Usono.

126 Belinfante, D-ro F.J.,
West Lafayette, Usono.

127 Dormont, S-ro Louis, Brooklyn,
Usono.

128 Falgier, S-ro George, St. Louis,
Usono.

129 Futran, S-ro John, New York,
Usono.

130 Gilfillan, S-ro S. Colum, Chicago,
Usono.

131 Mc Culloch, S-ro Robert C.,
Keesler, Usono.

132 Parker, S-ro George P., Queens,
Usono.

133 Porter, F-ino M., Los Angeles,
Usono.

134 Regal, S-ro Arthur E., Downers
Grove, Usono.

135 Schulze, S-ino Cath. L.,
Hillsborough, Usono.

136 Turner, S-ro Glenn P., Middleton,
Usono.

137 Taylor, S-ro Frank V., Albury,
Aŭstralio.

138 Meister, D-ro Oskra, Graz,
Aŭstrujo.

139 Beaumont, S-ro B. B., Fartown,
Britujo.

140 Bevan, S-ro Geoffrey, Wrexham,
Britujo.

141 Boulton, F-ino M., Stoke-on-Trent,
Britujo.

142 Buttinger, S-ro Phillip, London,
Britujo.

143 Crabtree, S-ro E. P., Huddersfield,
Britujo.

144 Dickinson, S-ro G. L., Liverpool,
Britujo.

145 Fraser, S-ro T. C., Kirkcaldy,
Britujo.

146 Goulding, S-ro E. Irvine, Woking,
Britujo.

147 Ingham, S-ro H., Liverpool,
Britujo.

148 Langham, S-ro W., Iver, Britujo.

149 Middlemast, S-ro Arthur H.,
Bournemouth, Britujo.

150 Murray, S-ro R., Thorpe Bay,
Britujo.

151 Prince, S-ro A., Letchworth,
Britujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Cakl, S-ino Olga, Wien, Aŭstrujo.

Wilke, S-ro Harry, Berlin, Germanujo.

PATRONO 1960

2. Lewin, S-ro Maurice, Dunstable,
Britujo.

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro B. B. Beaumont, Britujo 21.20
gld., S-ro N. G. Nilsson, Svedujo 2.19
gld.; S-ino Catherine Schulze, Usono
37.70 gld.

FONDAJO ZAMENHOF

Korekto en la listo publikigita en la
okt. no. '59 : Anstataŭ "Ges. Potts 106.-
gld." legu "Ges. B. Potts 53.— gld.;
S-ro M. Potts 53.— gld."

Antaŭa sumo : 17.681,21 gld.

Franz Nawratil, Aŭstrujo 1.45 gld.;
Jules Verstraeten, Belgujo 1.— gld.;
W. O. Bishop, Britujo 53.— gld.; Rig-
mor Petersen, Danlando 5.45 gld.; Ges.
Saretto, Francujo 7.70 gld.; Josef
Grundhoff 22.26 gld., Harry Wilke
45.10 gld., F-ino Else Mattern 0.45 gld.,
D-ro Hermann Lamprecht, 2.26 gld.,
Germanujo; Delfi Dalmau, Hispanujo
5.— gld.; Lj. Negovetiĉ, 3.— gld.,
P. Jovoviĉ 3.— gld., Jugoslavio; Joa-
quim Calado, 5.— gld., Hans Bakker
2.50 gld., H. Voogd 5.— gld., J. E. Prins
5.— gld., D. M. Ponti 8.— gld., J. de
Vries 10.— gld., L. Th. Kamman 7.50
gld., N.N. en V. 25.— gld., J. V. Holle-
man 10.— gld., Nederlando; R. Freeth,
Nov-Zelando 1.32 gld.; Geedzoj J. An-
tunes, 26.44 gld., Raul Picado Júnior
2.64 gld., Artur Hipácio 6.61 gld., Por-
tugalujo; Folke Nilsson, Svedujo 5.10
gld.; Joel Silverman, 3.77 gld., Usono.

Entute 17.954,76 gld. je 1.2.1960.

Daŭrigu vian kontribuadon por sub-
teni la plian agadon de la Asocio por
firmigi la poziciojn akiritajn dum la
Zamenhof-Jaro !

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ino Klara Justis, Usono 6.02 gld.;
"La donacoj estu decaj, ne hontigaj",
Usono 18.85 gld.; S-ro Roland Barta,
Usono 2.83 gld.; S-ro Clement N. Ayres,
Usono 4.71 gld.

DONACO POR LA BELARTAJ KONKURSOJ 1960

"La donacoj estu decaj, ne hontigaj"
259.11 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.
M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

ANONCETOJ

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj manĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, LONDON W. 9, Britujo. Telefono CUNningham 4487.

Famekonatan francan brandon KON-JAKO disvendas s-ano Despeyroux, reprezentanto, 200 rue du Fg Saint-Denis, Paris 10^e. Aŭtentikeco kaj altkvalito garantiataj. Senpera ekspedo ekde la produkto en ĉiujn pagipovajn landojn. Informpetu!

Belga Turista Servo: Ĉian informon turistan prizorgas R. Loeckx, Konijnenperken 108, Bruselo 17, Belgujo, kontraŭ respondkuponon.

Esperanto-Civito, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo, invitas ĉiujn emeritulojn, nelaborulojn ks., fari Dovron centro de vivado. Fonduso (por aĉeti unuan domon) staras je £ 12.2.10. Vin turnu al "Dovra Soleo".

30 junaj lernantinoj deziras tutmonde korespondi. Skribu al: Jean Armatte, 7 bis rue Général Joubert, Dyon, Francujo.

Printempan letervesperon ni organizas

fine de marto. Amase sendu bildkartojn, leterojn. Dankrespondo garantiata, Esperanto Junulara Rondo, Garncarska 18, Gdansk, Pollando.

Korespondservo internacia. Sendu adreson, aĝon, temojn, landojn deziratajn. S-ino Vincent, Les Andelys, Eure, Francujo.

Novaj geesperantistoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj, interŝanĝi il. p.k., k.a. Dezirantoj sendu leterojn al la adreso Stanas Bojaĝiev, kursgvidanto, str. "Zografska" 35, Kolarovgrad, Bulgarujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

Esperanto parolata 1960! Tutmonda Adresaro: 1.40 NF (poŝtkonto: Paris 1042-07) = 3 rpk. = 4 steloj: Rétot, 162 Aristide Briand, Montreuil (Seine), Francujo.

Kievaj geesperantistoj deziras vastan korespondadon kun tuta mondo. Adreso: U.S.S.R., Kiev-56, do vostreb V.V. Molebnyj.

Tinkturisto (sek-purigisto) deziras korespondi pri profesiaj aferoj. Manfred Fühler, Kleiderreinigung, Gebr. Grogg,

Aarwangenstr., 65, Langenthal, Svislando.

Mi korespondas kun ĉiu interesulo, precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri: kio en E estas facila por vi, kio ne! Kio plaĉas al vi, kio ne! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro, vortmaterialo kaj formado ktp. Atentu mian jubilean anoncon en jarlibro 1959, p. 332! H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

La Hungarlandaj Esperantistoj 14-15-an de majo 1960 renkontiĝos okaze la "3-a Nordhungarlanda Esperanto renkontiĝo". La Aranga Komitato petas ĉiujn esperantistojn sendi materialojn por ekspozicio kaj salutkartojn. Ĉiu sendinto ricevos Esperanto presajon. Adreso: "Esperanto renkontiĝo" Miskolc-2, Pf. 206. Hungarujo.

Gekursanoj post fino de komenca kurso deziras korespondi per bildkartoj. Adreso: "Kisz Esperanto kursrondo" Sajóbáony. Lakótelep, Kiszotthon Borsod m. Hungarujo.

Gesamideanoj de l' tutmondo, kiuj interesiĝas pri la rusa lingvo aŭ jam studadas ĝin, leterkontaktiĝu kun rusa esperantisto: A. K. Savostianov, P.K. 466, Moskva, Centr. U.S.S.R. Li estas preta laŭeble helpi.

TIU ĈI NUMERO ESTAS LA LASTA

KIUN VI RICEVAS, ĜIS VI ESTOS PAGINTA VIAN KOTIZON 1960.
ZORGU, KE NENIU NUMERO MANKOS AL VI! SE VI FORGESIS ĜIS NUN,

PAGU TUJ!

100

**eksterordinaraj
ekzempleroj**

de la

MEMORLIBRO

numeritaj kaj subskribitaj de la Prezidanto
kaj Sekretario de I.O.K. kaj U.E.A.

estos riceveblaj

je la prezo de po 25.— gld.,
100.— steloj

**POR ESTI UNU EL LA FELIĈAJ
POSEDONTAJ DE TIU RARAĴO
MENDU ĜIN TUJ ĈE U.E.A.!**

EN TIU ĈI JARO

OKAZE DE

ĈIU FESTO

ĈIU NASKIĜTAGO

ĈIU JUBILEO

ĈIU SUKCESA EKZAMENO

PLEJ INDA DONACO:

LA MEMORLIBRO

PRI LA ZAMENHOF-JARO

!!!

Definitiva prezo: 12,50 gld., 50 steloj.
Eldonas CED. Mendu ĉe UEA!

MARJORIE BOULTON



**VIRINO
ĈE LA LANDLINO**

NOVAJ TEATRAĴOJ

por kluba distro —
por lingva ekzerco kaj
profundiĝo.

196 p. — 28 steloj —
7 gld.

Bela bindo kaj prezento kiel la cetera

KOKO-serio :

F. Szilágyi : Mistero Minora, or. romano
"detektiva", 120 p. 24 steloj.

J. H. Rosbach : Homoj kaj Riveroj, or. nove-
laro, 140 p. 24 steloj.

K. Kalocsay : Ezopa Saĝo, fablaro verse
reverkita. 127 p. 18 steloj.

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe Eldonejo KOKO, Randbølvej 4,
Kopenhago F (aŭ petu prospekton kun mendilo !)

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj en la Internacia
Altlernejo de Helsingör, Danlando, okazos
17. — 24.7.1960.

Kursoj : Daŭriga, Perfektiga kaj Prepara kurso por
Cseh-metodaj instruantoj.

Prospekto havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Cefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio : 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio : 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

Esperanto- Eldonejo Limburg / Lahn

prezentas siajn librojn :

El la vivo de Netaŭgulo. De J. v. Eichendorff
140 paĝoj, tole bindita gmk 4.80

La Nekonatino. De Reinh. Conr. Muschler
66 paĝoj, bindita gmk 3.—, broŝurita gmk 2.—

Trifoje akurate je la dekdua horo.
Kriminalromano de Walter Galdert
160 paĝoj, kartonita gmk 4.90

Sageoj kaj rakontoj laŭlonge de l' Rejno.
De Johanna Pagenstecher
48 paĝoj, kartonita gmk 2.85

Junularo kantas. (Kantaro sen muziknotoj)
144 paĝoj, bindita gmk 3,80, broŝ. gmk 3.—

Letero el la transcendo. De A. B. Krempel
35 paĝoj, broŝurita gmk 1.20

Niko kaj Nina. Rakonto por komencantoj.
De J. F. Berger.
72 paĝoj, kartonita gmk 2.40

La arto fariĝi centjara.
De Ludwig Wegener
60 paĝoj, broŝurita gmk 2.—

Kiel aŭtodidakto al pedagogia scienco.
De Clemenz Wiczorek.
39 paĝoj, broŝurita gmk 1.80

Lernolibroj — Vortaroj — Varbiloj — Afiŝoj

N.B. Koncerne la prezojn : 0,30 gmk = stelo.

Mendu ĉe :

Esperanto-Eldonejo Limburg/Lahn

Diezer Str. 19, Germanujo

aŭ ĉe :

Universala Esperanto-Asocio

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando

La plej fama verko de



IBSEN: PEER GYNT

Drama poemo kun komentario
kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis
E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld., broŝ. 6,30 gld

Eldonis : ELDONA RONDO, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**
Eendrachtsweg 7 — Rotterdam-C. — Nederlando



Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam

MARJORIE BOULTON



**VIRINO
ĈE LA LANDLINO**

NOVAJ TEATRAĴOJ

por kluba distro —
por lingva ekzerco kaj
profundiĝo.

196 p. — 28 steloj —
7 gld.

Bela bindo kaj prezento kiel la cetera

KOKO-serio :

F. Szilágyi : Mistero Minora, or. romano
"detektiva", 120 p. 24 steloj.

J. H. Rosbach : Homoj kaj Riveroj, or. nove-
laro, 140 p. 24 steloj.

K. Kalocsay : Ezopa Saĝo, fablaro verse
reverkita. 127 p. 18 steloj.

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe Eldonejo KOKO, Randbølvej 4,
Kopenhago F (aŭ petu prospekton kun mendilo !)

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj en la Internacia
Altlernejo de Helsingör, Danlando, okazos
17. — 24.7.1960.

Kursoj : Daŭriga, Perfektiga kaj Prepara kurso por
Cseh-metodaj instruantoj.

Prospekto havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio : 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio : 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

Esperanto- Eldonejo Limburg / Lahn

prezentas siajn librojn :

El la vivo de Netaŭgulo. De J. v. Eichendorff
140 paĝoj, tole bindita gmk 4.80

La Nekonatino. De Reinh. Conr. Muschler
66 paĝoj, bindita gmk 3.—, broŝurita gmk 2.—

Trifoje akurate je la dekdua horo.
Kriminalromano de Walter Galdert
160 paĝoj, kartonita gmk 4.90

Sageoj kaj rakontoj laŭlonge de l' Rejno.
De Johanna Pagenstecher
48 paĝoj, kartonita gmk 2.85

Junularo kantas. (Kantaro sen muziknotoj)
144 paĝoj, bindita gmk 3,80, broŝ. gmk 3.—

Letero el la transcendo. De A. B. Krempel
35 paĝoj, broŝurita gmk 1.20

Niko kaj Nina. Rakonto por komencantoj.
De J. F. Berger.
72 paĝoj, kartonita gmk 2.40

La arto fariĝi centjara.
De Ludwig Wegener
60 paĝoj, broŝurita gmk 2.—

Kiel aŭtodidakto al pedagogia scienco.
De Clemenz Wiczorek.
39 paĝoj, broŝurita gmk 1.80

Lernolibroj — Vortaroj — Varbiloj — Afiŝoj

N.B. Koncerne la prezojn : 0,30 gmk = stelo.

Mendu ĉe :

Esperanto-Eldonejo Limburg/Lahn

Diezer Str. 19, Germanujo

aŭ ĉe :

Universala Esperanto-Asocio

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando

La plej fama verko de



IBSEN: PEER GYNT

Drama poemo kun komentario
kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis
E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld., broŝ. 6,30 gld

Eldonis : ELDONA RONDO, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**
Eendrachtsweg 7 — Rotterdam-C. — Nederlando

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam

